

# OOMOTO INTERNACIA

Esperanto-Gazeto  
Spiritualisma, Homaranisma kaj pri Japana Kulturo  
Monata Organo de  
Oomoto-Movado kaj de Universala Homama Asocio

**Oktobro**

**1935**



La Mondo de Homama  
(ĉiuj gentoj en granda rondo familia; la religifondintoj ĝojas pro la realiĝo de sia idealo.)

**DEK-JARA JUBILEO DE U.H.A.**

**Redakcio kaj Administracio:**

**Oomoto Centra Oficejo, Kameoka (Kioto-hu) Japanujo**

## OOMOTO-MOVADO

**DEVENO kaj CELO:** La vorto Oomoto signifas Grandan Originon. La Granda (aŭ Origina) Dio, Kreinto de la Universo, aperis en la sankta loko Ajabe (Japanujo) en la jaro 1892 kaj deklaris pere de Sinjorino Nao Deguei sian planon por la reformo de la mondo. Ni nomas Sin la Fondintino de Oomoto. La Dia Reformplano konsistas en la starigo de pli perfekta mondo, verdire la ĉielregno baldaŭ venos sur la tero. Oomoto-Movado fervore laboradas por la baldaŭa efektivo de la Dia Plano.

**NUNA STATO de OOMOTO:** Post la ĉeliro de la Fondintino, nia movado daŭrigas la agadon sub la aŭtoritata gvidado de Majstro Onisabro Deguei, adoptita filo de la Fondintino. Li estas eksterordinara homo, vera geniulo, eminenta en diversaj artoj kaj scioj. La nuna mondo baraktas meze de ekonomiaj, sociaj, politikaj kaj aliaj malsanoj. Ni firme kredas, ke nia spirita Gvidanto estas la de Dio destinita Homo, sole kapabla piloti la ŝipon de la homaro el inter la rifoj de hodiaŭo al la paca haveno de morgaŭo.

La Centro de Oomoto sin lokas en Ajabe, la Administrejo en Kameoka (Japanujo). Lokaj Centroj estas en Mukdeno kaj San Paŭlo, kaj pli ol 2,000 filioj ekzistas ne nur en Japanujo sed tra la mondo. Krom pluraj japanlingvaj organoj, monata gazeto «Oomoto Internacia» aperas en Kame-

oka. Nia Doktrino estas tolerema: ni unuigas kun Orientaj potencaj spiritmovadoj kiel Tao-Yuan kaj Universala Rugŝvastika Asocio; ni ankaŭ kunlaboras kun pluraj spiritaj kaj religiaj movadoj — Tsaili-Hui, Puch-Hui, Anching-Chao, Lamaismo en la Oriento kaj Blanka Frataro, Grandega Mond-Kristana Spiritualista Ligo en la Okcidento. Ni ankaŭ fondis Universalan Homaman Asocion kaj Ligon de Religioj, kiuj bone laboras por la mondpaĉo. Ni vokas al la tutmondaj gesamideanoj je komuna kunlaborado por pli bona kaj pli bela estonteco.

**MAKSIMOJ:** 1) Observu la veran aspekton de la Universo kaj konsideru, ke ĝi respegulas la **Korpon de Dio**. 2) Konsideru la seneraran funkciadon de la Universo kaj rekonu la **Forton de Dio**. 3) Konsideru la koron de la vivantaj kaj komprenu ke ĝi estas koncipita de la **Animo de Dio**.

**ĈEFINSTRUO:** Dio estas Spirito loĝanta en ĉio de la Universo, kaj homo estas la reganto de la mondo. Kie unuigas Dio kaj homo, tie ekestigas senlima forto kaj aŭtoritateco.

**DEVIZOJ:** 1) Harmonio inter Dio kaj homaro. 2) Instruo pri Dia Vero. 3) Fundamenta moralo. 4) Sankta karaktero de la misio.

**PRINCIPOJ:** 1) Pureco de animo kaj korpo. 2) Unuigo inter klasoj de la socio. 3) Optimismo pri la aranĝo de Dio. 4) Progresemo por la socia plibonigo.

## UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

**CELO** de UHA estas fratigo de la homaro sur la bazo de la Homaranismo. UHA celas plie labori por la efektivigo de la lumplena mondo, kie feliĉo kaj ĝojo floras por eterne. La homaro konsistas ja el gefratoj, kaj konkordo devas regi la tutan teron. Realigo de tiu ĉi idealo estas la plej alta celo de UHA. En la moderna epoko, la vivcirkonstancoj tute aliformiĝis, kaj la homa koro ĉiutage malpliboniĝas. Se oni permesas, ke tiu ĉi procedo daŭru, alvenos neevitebla katastrofo kaj la homaro multe suferos. Pro tio, ni kuraĝe eklaboru por disfaligo de la muroj inter nacioj, rasoj kaj religioj. Sur la bazo de Homaranismo, ni devas forigi la nunan kaoson kaj efektivi pli luman, pli trankvilan, pli belan kaj pli feliĉan mondon sur la tero. Jen estas la celo de UHA.

**UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO** estas fondita, laŭ la iniciato de S-ro Onisabro Deguei en Julio, 1925. La Centro estas en Kameoka; Majstro O. Deguei estas la Prezidanto kaj Sinjoro

Hidemaru estas la Vicprezidanto.

Kvankam ĝia historio estas mallonga, la movado disvastiĝis kun mirinda rapideco sur la tuta tero: ĝi havas Azian Centron en Tokio, Manĉurian Centron en Mukdeno, Brazilan Centron en Uberlandia; krome pli ol 1,300 filioj troviĝas en la tuta mondo. Manpremane aŭ unuiginte kun samcelaj movadoj en Eŭropo kiel ankaŭ en Azio, UHA klopodas kunfandi la tutan homaron en unu familian rondon kaj efektivi harmonian kunvivadon kaj kunprosperon de la tuta homaro «Zinrui-Aizen-Sinbun» estas organo por Japanujo: ĝi aperas en Tokio tri foje monate po ĉ. miliono da ekzempleroj. «Oomoto Internacia» estas internacia monata organo en Esperanto: ĝi fervore batalas por disvastigo de Homaranismo.

**ALIĜO** al UHA estas libera kaj senpaga formalajo. Dezirantoj skribu rekte al la Centra Oficejo la nomon, adreson, aĝon kaj profesion.



Sinjoro Onisabro Deguči, Prezidanto de UHA,  
 ĉe la Dekjara Jubileo de UHA.



Sinjoro Hidemaru Deguči, Vicprezidanto de UHA.



S-ro Učimaru  
Degučî, Admi-  
nistranto de  
UHA.

(maldekstra)

S-ro Koogecu  
Nišimura, Di-  
rektoro de  
UHA.

(dekstra)

S-ro Jasuhiko  
Tezuka, Estro  
de UHA-Centro  
de Manĉurujo.  
(maldekstra)



S-ro Cugio Iŝi-  
do, Estro de  
UHA-Centro de  
Brazilo.

(dekstra)



S-ro Takateru  
Kitamura, Estro  
de UHA-Branĉa  
Societo de Nor-  
da Ĉinujo.

(maldekstra)



S-ro Kijozumi  
Kakehi, UHA-  
Sendito al Sia-  
mo.

(dekstra)

# OOMOTO INTERNACIA

MONATA ORGANO de OOMOTO-MOVADO kaj de UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

Jaro 11

Oktobro 1935

N-ro 10 (122)

Ĉefredaktoro: Koogecu Nišimura. Nia Devizo: «Internacia Redakcio — Internacia Legantaro». Por ĉiu artikolo respondas la subskribinto. Manuskriptojn ne petitajn ni ne resendas. Honorario ne pagebla: por artikoloj publikigitaj ni sendas pruvekzemplerojn. Pri abonkotizoj, ktp. vidu la lastan paĝon.

Adreso de Redakcio kaj Administracio: Oomoto Centra Oficejo, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

## <sup>A</sup>Gisnuna laboro kaj nova Espero de U.H.A.

— Koogecu Nišimura —

La Universala Homama Asocio estas fondita laŭ la iniciato de Majstro Onisabro Deguĉi en la 9a de Junio, 1925, kaj ĝia dekjara jubileo solene okazis en Kameoka, okaze de lia naskotaga Festo en Aŭgusto de tiu ĉi jaro. Pri la motivo de l' iniciato oni trovos lian paroladon en alia loko de tiu ĉi gazeto. Unu jaron antaŭ fondiĝo de U.H.A., nia Majstro tramigris en Mongolujo por disvastigi Dian Instruon, kaj li vidis tie la popolon suferantan, eĉ pereontan ambaŭ morale kaj fizike pro degeneriĝo de religioj kaj malsanoj. Nia Majstro rekonis, ke la homoj sin turmentas aŭ minacas unu la aliajn simple pro memamo; alivorte la nuna homaro vivas tute bestan vivon kaptite de diablecaj principoj, t.e. perfortismo, egoismo. Kreskis en la koro de la Majstro simpatio kaj decido, ke li gvidu la homaron al pli luma kaj feliĉa mondo liberigita de kruela interbatalo. Ĝuste por tiu idealo la Majstro fondis la Universalan Homaman Asocion antaŭ dek jaroj.

U.H.A. establiĝis, kaj nur tri tagojn poste mi ekveturis al Eŭropo laŭ la komisiono de la Majstro. Tiutempe Eŭropo ankoraŭ sentis neforviŝeblan doloron pro la granda mondmilito; malamo kaj kontraŭstaro persiste regis inter la popoloj. Fremda homarano el Oriento venis en la mezon de eŭropanoj *civilizitaj* laŭ ilia aserto, kaj li sciigis Oomoton kaj novan evangelion al ili, kiuj verŝajne en la komenco ne aŭdis serioze liajn vortojn. Tamen nia serioza laboro neniam haltis dum la lastaj dek jaroj. Certe en Eŭropo oni furioze batalas kiel kruelaj ŝakaloj, sed ankaŭ troviĝas per-

sonoj, kiuj aspiras al pli paca kaj pli feliĉa vivo. Ili komprenis la spiriton de U. H.A., kaj eĉ ĝis hodiaŭ niaj simpatiuoj daŭrigas sian energian laboron en ĉiu lando de Eŭropo. Ili vere meritas nian grandan dankemon. Alian dankon kaj respekton devas ricevi tiuj simpatiuoj, kiuj per neŝparema helpo nin kuraĝigis kiam ni eldonis «Oomoto Internacia» en Parizo, kaj «Oomoto» en Japanujo, enkondukinte la neŭtralan Lingvon en Oomoton, antaŭ ĉiuj aliaj religioj kaj spiritaj movadoj.

Nuntempe la Asocio kunlaboras kun dekoj da movadoj kun la sama celo kaj 1,233 filioj (statistiko en julio de ĉi tiu jaro) sidas sur ĉiu kontinento krom Afriko. Precipe en la Oriento U.H.A. faras saltan progreson en sia laborsfero.

En Parizo ni proponis la starigon de la «Domo de Homamo» kaj akiris grandan aprobon kaj eĉ helpbrikojn, sed bedaŭrinde la «Domo» ankoraŭ ne realiĝas, kvankam ni neniam forjetas la esperon, ĉar ĝi estas nova monumento de nova Epoko. En Brazilo jam elkonstruiĝis du «Domoj de Homamo» kiuj sin prezentas kiel paradizo por internacia frataro. Ankaŭ en Koreujo, Manĉurujo kaj Siamo «Domo de Homamo» stariĝis lastatempe.

La paco de Eŭropo — regno de Kristanismo, estas ĉiam minacata, pro veneno de la materia civilizo kaj sklaviĝo sub demonaj ungoj. Malamo de Satano anstataŭ Amo de Kristo regas tutan Eŭropon, tiel ke konfliktoj sin sekvas. Ankaŭ Hindujo naskinta Budaismon, Ĉinujo de Konfucismo kaj Arabujo de Islamo, ili ĉiuj, doma-

## Parizaj Rememoroj

— Jozefo Major —

Fore, malantaŭe en la tempofluo sed neforgeseble enĉizite en mia animo troviĝas miaj parizaj rememoroj. Parizo postlasis sur mia koro fajran stampon kaj U. H. A. intime miksiĝas al miaj travivaĵoj en la ombro de l'



Jozefo Major

Eiffel-turo. Tiun ĉi nokton mi cerbe elvokas la fantomojn de miaj parizaj kunuloj: fantomoj ili estas ĉar ni ĉiuj ŝanĝiĝas en la fluo de la tempo kaj mia hodiaŭa personeco estas tiom malsama al mia pariza figuro, ke mi hezitas identigi min al ĝi. Kio mi fariĝos post pluaj dek jaroj? Ho, misteroj eternaj de l' vivanta mondo....

Kiel ora sunlumo de printempa mateno aperis sur la horizonto de mia juneco mia kara sinjoro Koogecu Niŝimura. Mia intuicio diris al mi, ke mi iam havos seriozan rilaton al tiu mistera Oriento kiun li reprezentis. Dank' al Esperanto, tiu magia ŝloŝilo, mi baldaŭ estis disĉiplo kaj kunlaboranto de sinjoro Niŝimura. Aperis «Oomoto Internacia», grandformata monata gazeto kun la bonekonata U.H.A. koloroj sur la unua paĝo. La mondo estis ekkononta Oomoton....

ĝe, en niaj tagoj staras antaŭ preskaŭ disfalo.

Ni firme kredas ke la respondeco de U.H.A. estas treege grava en la konstruo de vera kulturo spirita, kaj per tiu ĉi konvinko ni ĵuras pli kuraĝe antaŭen marŝi! Estas ankaŭ granda fiero por ni, ke ni havas Prezidanton kiel universale rekoni-

La unua kunlaboranto estis tamen ne mi, sed s-ro Salo Grenkamp-Kornfeld, la nuna redaktoro de «Nia Gazeto». Lia nomo estas bone-konata en Esperantujo. Oni scias, ke li debutis kiel poeto. Pli grandan sukceson li atingis tamen kiel vortaristo, komentariisto, tradukisto, ĵurnalisto kaj oratoro. S-ro Grenkamp estas «universala tipo»; lia elparolo estas modela tiel ke gramofon-kompanio petis lin enparoli ĉe eldono de per-diska instrumentado de nia lingvo.

Tiutempe tamen, kiam fondiĝis U.H.A., sinjoro Grenkamp ne estis ankoraŭ tia eminentulo sed nur simpla, kvankam promesiga junulo. Ke sinjoro Niŝimura tamen lin elektis kiel unuan kunlaboranton, tio pruvas la grandan takton de tiu ĉi modesta propagandisto de Oomoto.

\*

U.H.A. estas idealisma asocio materie ne tre potenca. Homoj pelas materiajn avantaĝojn, alimaniere ili ne povas vivi. Nur malmultaj emas al daŭra asketismo... Tio klarigas, ke dum la relative mallonga daŭro de la Pariza Oficejo tuta vico da kunlaborantoj sin sekvis. Tio estas tamen bone, ĉar anstataŭ burokratoj ni havis ĉiam freŝajn fortojn kaj la ekzigintoj (pro profesiaj kialoj) fariĝis niaj propagandistoj.

Unu homo estis tamen dum pluraj jaroj fidela al sia tasko kiel sekretario de sinjoro Niŝimura: s-ro V. M. Ŝiŝkov. Li

tan grandulon ardantan je granda amo kaj brilantan je profunda saĝo! Okaze de la dekjara jubileo ni sincere esperas fortikan sanon al ĉiuj U.H.A.-anoj, kaj petas pli meritplenan kunhelpon de la samideanoj en la tuta mondo!

## Saluton al U.H.A.

— Marko Polo —

estis venigita de la majstro mem, el fora Bulgarujo. Mi ankoraŭ bone memoras la momenton kiam mi malfermis al li la pardonon, frumatene. Elkore ridetis al mi la juna, sane-ruĝa viro kaj ni manpremis kiel nur esperantistoj povas...

Komence s-ro Ŝiŝkov estis tre naiva, kiel oni povus supozi ĉe junulo el tiom fora lando. Li krome formangis nekredablajn kvantojn da pano. Tiuj ĉi trajtoj igis lin tre ŝatata al ĉiuj parizanoj kiuj, finfine estas ankaŭ naivaj, romantikaj kaj bonkoraj homoj. S-ro Ŝiŝkov sidis tamen firme en sia seĝo; li laboris fidele kaj fidinde kaj forlasis sian postenon nur kiam la Oficejo fermiĝis pro ordono de la majstro. S-ro V. M. Ŝiŝkov meritas esti eternigita en la kronikoj de U.H.A. kiel pioniro de unua rango.

S-ro Djudĵef estas alia bulgaro kiu multe helpis al ni. Li estis studento en la Sorbono, perfekta esperantisto, ĵurnalisto laŭ la intelektula tipo. Krome li estis bela kvazaŭ Donĵuano... En dandeco li estas komparebla nur al s-ro Otaka kiu dum unu jaro forlasis la Oomoto-teritorion kaj translokiĝis al Parizo por helpi sinjoron Niŝimura.

Dum tiu ĉi tempo la oficejo, kiu komence sidis en mizera hotelĉambro, translokiĝis al bela apartamento kaj poste en ankoraŭ pli belan... Skribmaŝinoj multobliĝis, libroŝrankoj plenigis la ejon, gramofono parolis esperante... nur radion sinjoro Niŝimura ne permesis, dank' al Dio! Aperis gazetoj, libroj, broŝuroj. U.H.A.-anoj regule vizitadis la internaciajn Kongresojn. Paroladoj estis okazigataj, ofte en la Universitato de Parizo... Tiu tempo estis flor-epoko de frua U.H.A.-historio.

Neeble estas mencii tie ĉi ĉiujn kunlaborantojn. Krome mi ne konis aŭ ne bone konis ĉiujn. Mi scias nur, ke mi ŝuldas grandan dankemon ekzemple al sinjoro Simon Frantz kaj aliaj, kies nomoj ne aperas al mia forgesema menso. Iliaj meritoj ne estas tamen forgesataj. Aliaj, pli zorgemaj kronikistoj notos iliajn nomojn kaj Dio pagos al ili por la servoj donitaj al Lia entrepren

Pli kaj pli ĝenerale oni agnoskas en Esperantujo, ke U.H.A. estas kvazaŭ la voĉo de konscienco en nia Movado. Fidele ĝi propagandas Homaranismon proponante laŭtempajn aldonojn, ĉiam harmoniajn al la granda Ideo de nia majstro Dro L. L. Zamenhof.

Se oni ne havus U.H.A., la ŝipo de nia Esperantista Movado velus kvazaŭ sen kompasoj. Efektive, nur konsiderante tiujn ĉi postmilitajn jarojn (mian esperantistan vivon), mi vidis la plej diversajn teoriojn aperi sur la paĝoj de nia gazetaro, ĉiuj el kiuj celis la moralan pravigon de la oportunisma agado de unuopaj samideanoj... Pro multaj arboj oni ne vidas la arbaron. Ard' dezirante la venkon de Esperanto en sia lando, oni forgesas tro ofte pri Esperanto en la vasta mondo, ne nur materie sed ankaŭ spirite. Efektive, nia lingvo devas kontentigi bezonojn plej ĝeneralajn kaj universalajn, geografie kaj ideo. Oni ne devas, eĉ ne rajtas, konsekvence suferigi Esperanton mem pro celoj specialaj de iu landa movado, de iu faka movado. U. H.A. estas grandioza harmoniigo inter la diversaj tendencoj, ĉar ĝi konstante rememorigas la Esperantistaron pri la sinceraĵ kaj originaj idealoj de nia Movado.

Se iuj pensus ankoraŭ naive, ke Esperanto povas progresi pere de malamaj kaj spirite kontraŭ-homaranismaj simpatiuloj, ili grave eraras. Spertoj montras pli kaj pli, ke nia Movado malsukcesas plej kompatinde, ĝuste tie kie iuj samideanoj promesis grandiozan venkon... se nur ili flatus la potenculojn (ili eĉ petis kaj ofte ricevis la helpon, de eksterlandaj samideanoj, eĉ de U.E.A.). Ni ne akuzas: propagandistoj kaj iliaj helpantoj agis pro bona intenco sed malsame al la devizo de la estiminda jezuita ordeno, la celo NE pravigas la rimedon! Revenu do Samideanoj al la Zamenhofaj Idealoj: ne timu ilin konfesi, suferu pro martireco prefere ol pro malestimo de la posteuloj. Nur tiel vi estos indaj al la Majstro, nur tiel vi helpos al Esperanto.

# Tutmonda Misio de U. H. A.

Parolado de Majstro O. Deguĉi, okaze  
de la Dek-jara Jubileo de U. H. A.

**E**n junio 1925 la Universala Homama Asocio fondiĝis kaj hodiaŭ ni okazigas la dek-jaran jubileon pri la naskiĝo de l' Asocio.

En la novjara tago de 1924, laŭ lun-kalendaro, mi ekvojaĝis al Mongolujo. Vojaĝante en Manĉurio, Mongolujo kaj Ĉinujo mi kontaktis kun la veraj cirkonstancoj de la popoloj kaj vidis la fakton, ke la plejparto el ili ĝemas sub jugo de perfortado, kaj minacataj de teruro de l' vivo ili vane serĉas novan vojon! Mi tiam firme konvinkigis, ke la tuta homaro antaŭ ĉio devas unuiĝi kiel frataro por marŝi la komunan vojon al mondpaco, alie, la paco kaj feliĉo de la mondo neniam efektiviĝos sur la tero.

Mi tiam vidis ankaŭ, ke la japanoj, mongoloj, ĉinoj, manĉuroj, koreoj kaj la ceteraj, malgraŭ ke ili parolas apartajn lingvojn, en persona kontakto povas bone interamikiĝi per komunaj sentoj. Individue, ĉiuj nacioj egale povas fariĝi fratoj, dum internacie, la problemoj fariĝas tre malfacila, ĉar en la lasta okazo, oni konsideras unue kaj ekskluzive la profiton de sia lando, neniam la ĝeneralajn interesojn de la homaro. Tio devenas de *memamo*, kontraŭ kiu mi ofte admonas en la «Rakontoj el la Spirita Mondo» kaj aliloke. Memamo aŭ egoisma amo ne estas *bonamo*, sed ja *malbonamo*.

Dio estas Amo — diris Jesuo kaj multaj aliaj. Kaj Amo de Dio estas *Bonamo*. Kelkaj homoj amas la havaĵojn de aliaj personoj, aŭ amas la edzinojn de aliuloj kaj tio estas ankaŭ amo, sed *malbonamo*.

Hodiaŭ nacioj leviĝas kontraŭ nacioj, kaj ĉiu nacio leviĝas «por la patra lando!» Tiel longe kiel la nacioj *ne* ekstaros ja «por la bono de la homaro!» — la paco

por eterne ne venos. La japanoj sin tenas malvarme kontraŭ aliaj nacioj pensante nur pri la bono de Japanujo: ankaŭ la ĉinoj, manĉuroj, angloj, italoj... ĉiuj por bono de sia propra lando. Tio estas memamo, kaj *malbonamo* laŭ juĝo de Dio. Por ni Oomotanoj kaj la membroj de U. H. A. ne estas parteca distingo inter malsamaj rasoj kaj gentoj! Mi kredas, ke *la universala bonamo* estas la sola ŝlosilo de l' mondpaco.

## OOMOTO KAJ U. H. A.

En julio 1923 mi enkondukis Esperanton en nian movadon. La lingvon Esperanton kreis D-ro Zamenhof, ĉar li vidis ke la ĉefa kaŭzo de malpaco, konfliktoj, militoj kuŝas en la malsameco de l' homaj lingvoj. Tial oni povas facile kompreni, ke la vera celo de Esperanto ne kuŝas en la lingvo mem, sed ja en la efektiviĝo de l' universala bonamo.

La mondo estas tre vasta kaj kiel ajn oni klopodus, per malgrandskala klopodo, oni ne povus vidi rapidan efektiviĝon de l' idealoj en mallonga daŭro de kvin aŭ dek jaroj. Tial reveninte de Mongolujo mi tuj fondis la Universalan Homaman Asocion, ĉar mi kredis, ke la disvastigo de l' universala bonama spirito estas la urĝa neceseco kaj sen ĝia — dissemado la mondpaco estas neebla.

La spirito de Oomoto kaj tiu de U.H.A. estas tute identa. En tiu tempo ankoraŭ la nomo de Oomoto estis treege miskomprenata pro la t.n. Oomoto-Afero, kaj tial mi intencis dissemi la ideojn de l' universala bonamo sub la nomo de U.H.A. (Zinrui-Aizen Kwai\*). Sed laŭ la vortanimisma etimologio, *zin* estas identa kun *O*, *rui* estas identa kun *Ho*, *ai* identa kun *Mo*, kaj *zen* kun *To*.

\* zinrui-aizen kwai: *zin* (hom-), *rui* (-aro), *ai* (amo) *zen* (bono), *kwai* (asocio).



Tiamaniere la vortoj OOMOTO kaj U.H.A. estas tute identaj el la vidpunkto de la Vortanimismo.

Sub la nova nomo de U.H.A. kolektiĝis ne nur oomotanoj, sed homoj religiaj aŭ nereligiaj, apartenantaj al plej diversaj sociaj rangoj, kleraj aŭ ne-kleraj, ĉiuj fariĝis membroj de l' Asocio. La nombro de UHA-filioj nuntempe kalkuliĝas ĉ. 1300, kaj ni devas ankoraŭ pli energie disvastigi eksterlanden la ideojn de l' universala bonamo.

Se la spirito de l' universala bonamo plene regus la mondon, ne povus okazi tia konflikto, kia ekzistas hodiaŭ inter unu nacio kontraŭ alia. En efektiveco, tamen, ili nur estas marionetoj, devigataj kontraŭstari unu la alian, pro egoisma artifiko de aliaj pli grandaj potencoj, kiuj moviĝas malantaŭ ili.

### RIĈULOJ KAJ MALRIĈULOJ

La homoj denature estas arbitraj kaj egoismaj. En fieraj tagoj ili neniom zorgas pri aliuloj, kiuj suferas en malespero. Tamen unu fojon enfalinta en malfacila situacio, oni komencas mem kompreni la suferon kaj doloron de la aliaj. Tiel same, la orelojn de l' fierantaj homoj nun ne tuŝas la Instruoj de Oomoto, nek la Idealoj de U.H.A. En la Nova Testamento Jesuo diras, ke estas pli malfacile por riĉuloj eniri la ĉielregnon, ol por la kamelo pasi tra la kudriltruo! kaj tio estas vera. Kiam malfacilo aŭ danĝero sieĝas, al Dio oni preĝas. En favoraj tagoj oni kultas prefere al mamono aŭ al sia propra saĝeco (aŭ instruiteco) kaj miskomprenas la veran vojon de l' homa vivo. Tiaj kompatindaj homoj estas multegaj, kies spirito enfalos en la inferon post la morto de l' fizika korpo. Sed ilin la membroj de U.H.A. devas savi per la sankta spirito de universala bonamo, por ke ankaŭ ili povu eniri *facile* la ĉielregnon! Materie riĉaj estas spirite malriĉaj — al ili mankas la lumo de Dio, kaj inverse. La homoj plej

longe vivas cent jarojn, sed ili povas vivi almenaŭ cent tridek jarojn. Por vivi tiom da plenaj jaroj oni bezonas ĉiam vivi kun la pura koro de infaneco ĝis la fino. Nia vivo ofte estas turmentata kaj minacata de l' ondoj kaj ventoj, sekve pli-malpli difektita: en la daŭro de sesdek jaroj oni mallongigas aŭ perdas la vivon je dudek aŭ tridek jaroj. Sed oni povas ankaŭ regajni tiom da perdo ja per nutrado al la spirito per Dikredo. Ni volas kiel eble plej longe vivi por la efektivigo de nia alta Idealo: universala bonamo de l' homaro. Plenuminte tiamaniere diversajn bonojn sur la tero, ni volas ankoraŭ daŭrigi eterne feliĉan vivon kaj ankaŭ la movadon en la ĉielregno. Tio estas la celo de Oomotanoj kaj la membroj de U.H.A. Per bonamo ni celas la Homaron, sekve ĝi ne estas partiam, nek egoisma, al kia la homoj ofte inkliniĝas. Egoismo estas alivorte, infera amo. Homamo estas bonamo — Dia amo, senpartia kaj malegoisma. Oni amas monon, floron aŭ belulilon. Sed tio estas ja pro memamo kaj tio estas ofte malbonamo. Al tiu malbonamo apartenas la plejparto de tio, kion oni komprenas hodiaŭ per la vorto «amo». Mi esperas, ke vi ĉiuj ne miskomprenos kaj partoprenos per forta bonamo la movadon de l' mond-purigado.

En Mongolujo mi renkontis eĉ la minacon de pafmortigo kaj brulmortigo, sed mi trovis eĉ tiam, ke oni kiel individuoj estas tre afablaj kaj amikaj. Jam ni mem devas montri al la homaro bonan ekzemplon de l' universala bonamo kaj la monda paco pli kaj pli facile efektiviĝos, ĉar tiam ĉiuj gentoj konsentos kiel fratoj manpremi unu kun la aliaj per niaj komunaj ideoj.

Malamon forigu antaŭ ĉio, ĉar ĝi kontraŭas la spiriton de Oomoto kaj U.H.A. Ne enfalu en memamon, partiamon kaj malbonamon, sed marŝu antaŭen por savi la tutan homaron sub la standardo de l' Universala Homamo! (Trad. N. Tazuo)

# Longe Vivu por Mond-Bonigado

## Junecon ni nutru al la spiritoj per Dikredo

Ekstrakto el la parolado de Majstro O. Deguči,  
okaze de l' Kongreso de l' Oomoto-Junulara Ligo.

**Aĝulo de sesdek —**

**Junulo de flav-bek'!**

**Ok- aŭ naŭdek jaroj —**

**Jam kun spertaj faroj!**

Laŭ proverbo, la aĝo de homo estas kvindek da jaroj. Sed la statistiko montras, ke la meznombra aĝo de morto en Japanujo estas kvardekses- aŭ sep-jara. Oni povas do kalkuli, ke mi supervivas la vivon je pli ol dudek jaroj. Sed tamen la vivo de la homoj ne konsistas el la fizika korpo, sed ja en la spiria. La korpo estas nenio alia ol la vazo aŭ loĝejo de la spirito. Kiam la spirito fariĝos kaduka, kadukiĝos ankaŭ la korpo. Kiel ajn nia spirito estos forta kaj vigla, nia korpo tamen ne povos vivi ducent jarojn, ĉar — ĉio materia estas mortema! Eterne senmortemaj estas la Dia Spirito kaj la spiritoj de l' homoj. Tial ni nutru antaŭ ĉio nian spiriton per Dikredo por ke ĝi estu ĉiam vigla kaj retenu la kadukiĝon de la korpo. Retenante la kadukiĝon de l' korpo per nutrado al la spirito mi deziras vivi ankoraŭ sesdek jarojn por la bono kaj feliĉo de la homaro. En la mondo troviĝas ne malmultaj homoj, kiuj vivis aŭ vivas tiom da longaj jaroj. Laŭ mia kredo la homoj nature povas vivi tiom da jaroj depende de sintenado de la spiritoj.

La plej longeviva el ĉiuj animaloj estas la elefanto: ĝi povas vivi ducent kvindek jarojn. La homo povas vivi cent tridek jarojn. La gruo cent jarojn. La testudo naŭdek. La plej mallongeviva estas la *liburnio*,<sup>①</sup> — ĝi vivas nur kvin minutojn. Por vivi la plenan vivon de cent tridek jaroj la homoj devas vivi nature kaj konforme al la Volo de Dio. Multaj mortas en la aĝo de nur tridek, kvardek aŭ sesdek da jaroj, ĉar

ili vivas *kriple*, malkonforme al Dia Volo.

Ni vivas, marŝas ĉiam antaŭen kun la provera principo: *Aĝulo de sesdek — Junulo de flav-bek'!* *Ok- aŭ naŭdek jaroj — Jam kun spertaj faroj!* Do oni povas diri, ke mi ankoraŭ eĉ ne estas matura!

De l' antikveco estas la esprimo, *sesdek-jara infanulo*<sup>②</sup>: je la sesdek-jara aĝo mi iom konis la mondon kaj antaŭ tiu tempo mi ankoraŭ estis en la preparperiodo. Troviĝas ankaŭ alia esprimo, *eklerno de okdek-jarulo*<sup>③</sup>; en okdek-jara aĝo oni povas fari veran lernon de la vivo. Konsiderante tion oni povas vidi, ke mi devas vivi ankoraŭ dudek jarojn por ke mi atingu la aĝon de vivlernado.

Por kio ni do bezonas plene vivi longan vivon?

Ĉio en la mondo estas pli kaj pli progresanta, sed aliflanke, maljusto paralele estas kreskanta: sur la tero iom post iom malleviĝas nigra nubaro kiel en malluma nokto de l' pluva sezono<sup>④</sup>. Oni ne rekonas juston kiel juston kaj bonon kiel bonon. Ni bezonas rebonigi la mondon kaj savi la homaron: ne nur Japanujon kaj la japanojn, sed la mondon kaj la tutan homaron, dissemante la ideojn de la universala bonamo, la tradicia spirito de Nipponlando. Jen tie kuŝas la kaŭzo de la naskiĝo de Oomoto-movado, Sankta Movado, Universala Homama Asocio, Oomoto-Junulara Ligo, kaj la celo de tiuj ĉi movadoj estas nur unusola: dissemi la ideojn de l' Universala Bonamo tra la mondo por savi la tutan Homaron! (Trad. T. N.)

① enkondukita en la nove-aperinta Japana-Esp. Vortaro de J. Okamoto: *Nephotetix* — latine.

② signifanta: multjareco estas dua infaneco

③ signifanta: neniam estas tro malfrue por eklerni

④ esprimo laŭ klasika japana literaturo

# Laboroj de UHA dum 10 Jaroj

De sia fondiĝo en 1925, Universala Homama Asocio travivis 10 jarojn da historio dum kiuj ĝi faradis senlace diversajn multajn laborojn, de la vidpunkto de la Homamo. El ili nur ĉefajn ni citos jene, ĉar tro longa statistiko estas seka por la legantoj:

- ◆ Centra Oficejo Kioto, Japanujo
- Loka Centro*
- ◆ Korea Centro Keiĵo, Koreujo
- ◆ Manĉura Centro Mukdeno, Manĉurujo
- ◆ Siana Centro Bankoko, Siano
- ◆ Brazila Centro San Paulo, Brazilo
- ◆ Eŭropa Centro Parizo, Francujo  
(provizore fermita, 1932)

## Branĉa Societo (pli granda ol filio) kaj Filio

lando	branĉa societo	filio
Manĉurujo	9	200
Norda Ĉinujo	1	5
Koreujo	1	15
Sudmara Insularo		20
Formoso		13
Suda Ameriko	1	18
Norda Ameriko		6
Holanda Ĉinujo		1
Aliaj fremdaj landoj		20
Japanujo	6	935
	18	1233

## iano laboro

- 1923 jul. Oomoto alprenis Esperanton, kiel la lingvon de sia propagando al fremdaj landoj.
- 1925 jan. Esperanta gazeto monata «Oomoto», organo de Oomoto aperis kaj poste ĝi fariĝis organo ankaŭ de UHA.
- ” jun. UHA estas fondita.
- ” jun. S-ro Koogecu Niŝimura ekiris por propaganda vojaĝo al Eŭropo. Li ĉeestis al la 17a Universala Esperanta Kongreso en Genevo.
- ” nov. La organo, japanlingva grandformata ĵurnalo dekada estas ekeldonita en Kameoka.

- 1925 nov. Eŭropa Centro de UHA fondiĝis en Parizo.
- 1929 aŭg. Oni ekentreprenis la konstruon de «Domo de Homamo» en Eŭropo.
- ” sept. 20 reprezentantoj de Taoĵuan kaj Ruĝ-svastika Asocio, kiuj estas grandapotencaj spiritmovadoj en Ĉinujo, venis al Kameoka. Tiuj movadoj kaj UHA amike komunikadis jam de longe, kaj nun finfine ili unuiĝis.
- ” okt. Prezidanto s-ro O. Deguĉi kaj lia edzino veturis al Ĉinujo, kun la reprezentantoj de Taoĵuan kaj Ruĝ-svastika Asocio.
- 1930 mar. UHA partoprenis al Japana Religia Ekspozicio en Kioto, kiu estis okazigata por la unua fojo en Japanujo.
- ” majo. UHA-ĵurnalejo translokiĝis de Kameoka al Tokio.
- ” majo. S-ro Hou Yenshuang, reprezentanto de Taoĵuan (Ruĝsvastika Asocio) translokiĝis al Kameoka kaj okupiĝis pri la kontakto kun UHA.
- 1931 sept. Vicprezidanto s-ro Hidemaru veturis al Manĉurujo tuj post la Konflikto.
- ” nov. S-ro Uĉimaru veturis al Manĉurujo.
- ” nov. Kunlaborante kun Taoĵuan, UHA okazigis koncerton, per kies profito ĝi savis ĉinojn kaj koreojn suferantajn pro inundo en Manĉurujo.
- ” nov. En Mukdeno s-ro Hidemaru kunvenis kun la reprezentantoj de Greka Ortodokso, Mahometanismo kaj Blanka Siberia Asocio en Manĉurujo kaj ili decidis, ke iliaj movadoj interrilatiĝu en plena amikeco.
- ” dec. UHA manpremis kun Shéngtao-lishan-hui, spirita movado en Manĉurujo kaj interŝanĝis la dokumenton.
- ” dec. Laŭ la ordono de Taoĵuan-Centro, s-ro Hou forlasis Kameoka post unu jaro da restado.
- ” dec. Manĉura Centro de UHA estas fondita en Mukdeno.

- 1932 apr. UHA-jurnalejo en Tokio okazigis la «Ekspozicion de Belartajoj de la Tutjapanaj Liceaninoj»; kaj oni dissendis la kolektitajn verkojn al pli ol 40 fremdlandoj.
- ” jul. En Tokio UHA okazigis «Ekspozicion pri Manĉur- kaj Mongolujo» (10a, julio — 10a, sept.), por doni al la japanoj veran konon pri la landoj.
- ” dec. Estro de Eŭropa Centro, s-ro Nišimura reveturis al Japanujo; sekve tiu Centro estas fermita provizore.
- 1933 jan. «Oomoto Internacia», organo de Pariza Centro kaj «Oomoto» unuiĝis kaj la titolo fariĝis «Oomoto Internacia».
- ” jun. Venis al UHA-Centro reprezentantoj de Shêngtaolishan-hui, el Manĉurujo.
- ” nov. «UHA-rizo», kiun oni povas semi sur senakva kampo, estis rikoltata kun granda sukceso en ĉiu parto.
- 1934 feb. Al la «Kongreso de Aziaj Gentoj» UHA en Tairen, sendis reprezentantojn.
- ” mar. Eldonnumero de UHA-jurnalo atingis milionon.
- ” mar. UHA amikiĝis kun Grandega Mondkristana Spiritualista Ligo en Anglujo.
- ” mar. UHA-movado en Siamo prosperiĝis inter la popolo kaj gravaj personoj multope aliĝis al ĝi.
- ” apr. En ĉefaj urboj de Japanujo, UHA okazigadis «Ekspozicion de *Koodoo* (vera japanspirito)», por restarigi la spiritan flankon de la japanoj.
- ” ” Ruĝ-svastika Asocio sendis 8,000 *gen* (ĉina mono) al UHA-Centro, por donaci al la urbestro de Hakodate, Hokkaido, trafita de brulego.
- ” ” Manĉura ŝtato sendis 10 reprezentantojn al Japanujo por danki al granda helpo de la japana ŝtato ĉe sia starigo; ili ankaŭ vizitis UHA-Centron por esprimi danksenton.
- ” jun. Venis al UHA-Centro s-ro Max Iriarte (insulano) el Ponape, Sudmara Insularo, akompanate de la estro de tiea UHA-filio, por studi la movadon dum unu jaro.
- ” ” S-ro Hidemaru, Vicprezidanto de UHA vidis generalon Chang Chiu-ghui, kiu estas prezidanto de Tatêng-Budaisma Asocio kaj la nuna Ĉefministro de Manĉurujo (tiam estis la armea ministro) kaj ili decidis, ke ambaŭ Asocioj kunlaboros amike por la spirita flanko de la popoloj.
- ” sept. UHA kaj Universala Morala Asocio en Manĉurujo manpremis kaj interŝanĝis la dokumenton.
- ” ” Ĉinaj kaj manĉuraj membroj de Ruĝ-svastika Asocio sendis 20,000 *yen* al UHA, por donaci al japanoj suferantaj pro teruraj vento kaj pluvo, kiuj atakis Mezjapanujon. UHA-membroj en Manĉurujo ankaŭ sendis 500 *yen*.
- ” okt. UHA-movado populariĝis inter formosaj indiĝenoj: multaj aliĝis al ĝi kaj plie al Oomoto.
- ” dec. Fame konata koreo s-ro Ri Kaiten sin donis al UHA kaj kolektis ĉefajn figurojn de tieaj religiaj kaj spirita movadoj sub la UHA-standardo. Dank’ al lia energia laboro, la inaŭgura soleno de Korea Centro okazis per la ĉesto de s-ro Hidemaru kaj 7,000 novaj aliĝintoj.
- 1935 apr. En Manĉurujo malfermiĝis «Japanlingva Lernejo», administrata de UHA, kun permeso de tiea japana konsulo. Ĝi instruas japanan lingvon al UHA-membroj.
- ” maj. Siam Centro estas fondita, kaj oni komencis konstrui «Domon de Homamo» en Bankoko.
- ” ” UHA-movado rapide etendiĝis en tuta Koreujo; ne nur koreoj sed

multaj tieaj japanoj aliĝis al la movado. Ankaŭ korea nobelo s-ro In Tokuei, konata kiel unu el iniciatintoj de «Unuiĝo de Japanujo kaj Koreujo», multajn jarojn okupiĝis

pri la orienta paco, kaj li fariĝis membro de Taojuan, frata movado de UHA, kun la opinio, ke la vera interpaciĝo de la aziaj gentoj povos realiĝi nur per spirita movado.

## Laboroj de Lokaj Centroj

### EUROPO

#### Eŭropo



La Homama Movado en Eŭropo komenciĝis de kiam s-ro Nišimura veturis tien en junio, 1925; li fondis Eŭropan Centron en novembro de la sama jaro. Al la Centro kolektiĝis kelkaj fervoraj batalantoj de la Homamo kaj ili ne ŝparis helpon al la brava japano, kiu sola veturis al tiom malproksima lando por la plej alta idealo de la homaro.

S-ro Nišimura estis tre energia por eĉ unu tagon pli frue propagandi la noblan ideon al la eŭropanoj: ĉiujare li partoprenis al la Universala Esperanta Kongreso kaj okazigis kunvenojn, li faris propagandan vojaĝon al nederlando, Ĉeĥoslovakujo, Germanujo, ktp.

Dank' al lia laborado, UHA amikiĝis en plena intimeco kun Blanka Standardo en Germanujo, 1926 kaj kun Blanka Frataro en Bulgarujo, 1927.

En jan. 1926, Pariza Centro komencis el-

doni sian monatan organon esperantan «Oomoto Internacia». «Oomoto» en la Oriento kaj «Oomoto Internacia» en la Okcidento, du organoj por fremdaj landoj, vigligante unu la alian, plenumis sian mision, pro kio nuntempe preskaŭ ĉiuj esperantistoj en la mondo scias UHA-movadon.

Estas tre notinde, ke UHA praktike kaj efike aplikas la internacian lingvon Esperanto por propagandi sian spiriton, kiu tute koincidas kun la interna ideo de Esperanto, kio konsekvence faris grandan bonon al la Esperanta movado en la tuta mondo.

Aperis tre fervoraj pacbatalantoj, kiuj per sia mono eldonis UHA-broŝurojn: nome s-ro Rudolf Burkert en Ĉeĥoslovakujo kaj nia amika movado, Blanka Standardo.

Krom la organo «Oomoto Internacia», s-ro Nišimura eldonis ankaŭ japanlingvan «Nippon-zin», romalitera monata ĵurnalo por japanoj estantaj en Eŭropo; ĝi havis sufiĉe da abonantoj ankaŭ en Japanujo.

Li revenis al Japanujo, 1927 kaj la sekvintan jaron denove veturis al Parizo, akompanate de s-ro Hideo Otakat.

En Aŭgusto, 1929, Pariza Centro ekenprenis la konstruon de *Domo de Homamo* kaj publikigis tion en la gazetaro; multaj eŭropanoj aprobis tion kaj esprimis sian subtenon al la *Domo* per donaco de brikoj.

16 UHA-misiistoj en 9 landoj kaj 16 filioj en 11 landoj.

En decembro, 1932, laŭ la ordono de Sinjoro O. Deguĉi, s-ro Nišimura forlasis Parizon kaj revenis al Japanujo; sekve Pariza Centro estis devigata fermiĝi ĝis proksima estonteco. *Oomoto Internacia* unuiĝis kun *Oomoto* kaj estas eldonata en Kameoka.

## SUDAMERIKO

## ■ Brazilo

En oktobro, 1926, s-roj Kondoo kaj Isido transloĝiĝis al tiu lando el Japanujo; de tiam UHA-movado estas tie semita. Ili fondis Oomoto-filion en San Paulo; kaj jaron post jaro UHA kaj Oomoto disvastiĝis inter la loĝantoj.

En julio, 1932, oni konstruis la «*Domon de Homamo*» en la eksterurbo de San Paulo. Estas tre notinde, ke plejparto el la tieaj UHA-kaj Oomotanoj estas fremdlandanoj kaj, ke la brazila registaro oficiale rekonis UHA-movadon, kies spirito estas tre efika por la kulturigo de la loĝantoj.

En marto, 1934, Brazila Centro fondiĝis en Minas-Geraes.

Dank' al brazilana bienulo, konstruiĝis «*Domo de Amdio*» en 1934. En tiu teritorio oni konstruis ankaŭ *Japanlingvan Lernejon*. 32 misiistoj de UHA energie laboras; du trionoj de la tutaj membroj estas brazilanoj.

## ■ Ĉilio

En 1931, s-ro Asai transloĝiĝis el Japanujo kaj fondis filion de UHA. Li gajnis cent-kelkdek abonantojn por UHA-jurnalo, el 600 japanoj estantaj tie; li fondis kun ili «*Societo de Amikeco*». Poste, kun helpo



de la japana konsulo s-ro Jāno, li fondis *Ĉilia Japana Societo*. Tiamaniere, dank' al lia senĉesa laboro, UHA pli kaj pli grandiĝas en tiel fora lando.

En Peruo, Meksiko, Kanado, pro klopodado de misiistoj, transirintaj el Japanujo, UHA-movado estas tre vigla kaj tie estas fonditaj kelkaj filioj.

## SIAMO

Nuntempe en Siamo furoras la movado de Universala Homama Asocio, kvankam ĝia historio en tiu lando estas tre mallonga. En julio, 1932, s-ro Kakehi veturis tien kaj kelkajn monatojn poste s-ro Saitoo. Post du jaroj da senlaca laborado de la du sinjoroj, iom post iom la Homama Movado altiris la atenton de la popolo, precipe de alteklasanoj kaj inteligentuloj: S-ro Nai Ĉaron Na Bangĉang (lia genealogio estas respektata samkiel tiu de la nuna Reĝo kaj li estas la prezidanto de Nacia Partio), admiralo Pija Maha Jota kaj aliaj gravaj personoj forte subtenis UHA-movadon. Dank' al ilia simpatio la movado tre vigliĝis: en la ĉefurbo Bankoko oni fondis la filion.

En la printempo, 1934, s-ro Kakehi revenis al Japanujo por raporti la staton de la movado kaj interkonsiliĝi pri ĝia plia vigligo, kun la estraro de la Centro; kaj la sekvintan jaron li denove veturis tien.

En aprilo 1935, laŭ la deziro de multnombraj membroj en Bankoko, oni entreprenis konstrui «*Domon de Homamo*», kiu elkonstruiĝos ĝis la fino de tiu ĉi jaro.

En majo, 1935, la filio eldonis broŝuron «*Homama Movado*» en siama lingvo kaj dissendis kiel eble plej vaste; la eĥo estis tre granda: la 25an de la sama monato fondiĝis la Siamana Centro en la ŝtata universitato, Bankoko.

Laŭ la lasta raporto de s-ro Kakehi, li intencas vojaĝi pli profunden al Franca Hind-ĉinujo, por komenci tie pioniran



kulturadon. Japana Centro do decidis sendi por anstataŭi lin s-ron Hukami al Siamo.

## MANĈURUJO

Okaze de la granda tertremo en Tokia distrikto en 1923, la reprezentantoj de *Ruĝ-svastika Asocio*, kies Centro sidas en Nanking, Ĉinujo, vizitis al Tokio kun granda sumo da mono, manĝaĵoj kaj aliaj necesaj; de tiam la kontakto inter tiu Asocio kaj UHA komenciĝis. Poste ambaŭ Asocioj kelkfoje interŝanĝis reprezentantojn ĝis ili tute unuiĝis en 1929. Tiu ĉi R.A. prenas sur sin la rolon de praktika laborado de *Taojuan*, kiu estas religieca, spirita movado grandpotenca en Ĉinujo.

Ĝis nun neniu japano povis propagandi religion en Ĉinujo, ĉar, kiam ĉefaj nacioj de la mondo kontraktis kun Ĉinujo antaŭ dekoj da jaroj, nur Japanujo rezignis la rajton de religia propagando; sed dank' al unuiĝo kun Ruĝsvastika Asocio UHA-anoj tute libere povas tion fari en tiu lando. Tio ja estas tiel granda sukceso de Majstro O. Deguĉi, ke oni devas tion noti grandliĝere ankaŭ en la japana diplomati

historio.

Tiu ĉi unuiĝo estis tre utila por moligi akriĝeman atmosferon inter japanoj kaj ĉinoj en Norda Ĉinujo kaj Manĉurio, despli en la okazo de la Konflikto.

Post la Konflikto, per kelkfojaj vizitoj de S-ro Hidemaru kaj aliaj eminentuloj de la Centro, la movado treege vigliĝis: multiĝis aliĝantoj de tieaj japanoj, ĉinoj, rusoj, mongoloj; kelkaj spiritaj movadoj proponis manpremon al UHA, dum profundigis la intimeco inter UHA kaj jam amikaj movadoj, per oftaj kunlaboroj. Manĉura Centro de UHA estas fondita en Mukdeno.

Profundaj distriktoj de tiu lando estas ankoraŭ danĝeraj: la vivo de vojaĝantoj estas ne malofte minacata de banditoj, sed tamen la homamaj batalantoj ne zorgis pri sia vivo: UHA sendis al diversaj lokoj «grupojn de kuracado», el kiuj du-tri grupoj vojaĝis tre profunden eĉ al Mongolujo kaj resanigis multajn suferantojn, por kiuj tie oni havas nenian metodon pro neciviliziĝo. La grupoj zorgis pri 5,500 malsanuloj dum 108 tagoj.

Kiel progresas la homama movado en Manĉurujo, oni povas konvinkiĝi per la nombro de la UHA-filio: 20 — antaŭ la Konflikto, 209 — post la Konflikto, aliĝantoj (japanoj, manĉuroj, ĉinoj, mongoloj, koreoj kaj rusoj) — 500,000.

En Manĉurujo loĝas ses rasoj, en tia loko Internacia Lingvo ja estas tre bezonata: Esperantistoj-UHA-anoj fondis filion de Esperanto-Propaganda Asocio en Mukdeno kaj okazigas la kurson.

*Domo de Homamo* estas jam konstruita.

### Tientsin

Ĉina urbo Tientsin estas grava punkto, de la vidpunkto de la interamikiĝo de Japanujo kaj Ĉinujo, ĉar komplikaj aferoj inter ambaŭ landoj ofte okazas en Norda Ĉinujo, kiu estas kontaktanta loko de la du poten-



coj; Tientsin estas plej granda urbo en tiu distrikto. UHA-Centro tre gravigis ĝin kaj sendis tien s-ron Kitamura en Januaro, 1933. La sekvintan jaron kvin junuloj veturis por lin helpi, ĉar lia laboro grandiĝis; kun sufiĉe da nombroj de subtenantoj kaj simpatiantoj de estantaj japanoj kaj ĉinoj, li fondis *Branĉan Societon* de UHA, kiu estas la centro de la homama laborado en Norda Ĉinujo.

Ĝi administras *Japanlingvan Lernejon*, kiu nuntempe havas 250 lernantojn, nur ĉinajn junulojn, kiuj kompreneble estas aliĝantoj de UHA. Tiamaniere amikeca atmosfero de ambaŭ popoloj pli kaj pli vastiĝas dank' al la klopodo de UHA.

## SUDMARA INSULARO

Ponape-filio estas fondita, 1931.

En 1933, UHA sendis s-ron Uŝiro, kiel specialan misiiston al la insulo, kaj sekvintan jaron s-roj Monĵi kaj Mijazaki ankaŭ veturis. Pro energia laboro de tiuj ĉi tri sinjoroj, membroj kalkuliĝis dum unu jaro preskaŭ 1,000 kaj sur kelkaj insuloj, filioj 16, el kiuj du-tri estas fonditaj nur de insulanoj.

Depost kiam s-ro Max Iriarte (filo de la tribĉefo de Ponape kaj estro de tiea junulara societo) revenis el la UHA-Cen-


tro en Kameoka, kie li restadis dum unu jaro por studi Homaman Spiriton, tre rapide vastiĝis la movado inter insulanaj junuloj, kiuj mem fondis Nat-filion.

Aliflanke UHA establis «Sudmaran Kulturenan Kompanion» kaj konstruis kelkajn fabrikojn de glacio, ligno, sekigita fiŝo, ktp. Ŝtata Ponape-Administrato donacis al la kompanio tre vastan kampon, kiun UHA nomis Homama Agrikulturejo. Por ĝin kulturisti 12 gejunuloj veturis tien el Kameoka en 1934. La movado progresas nun en ĉiu flanko.

Oni nun havas 29 filiojn preskaŭ en ĉiu insulo.

En julio, 1935, s-ro Uŝiro, ĉefo de la Agrikulturejo, reveturis al Japanujo, kun du insulanaj junuloj, nomataj Benno Jhonny kaj Ainrich Jhonny, kiuj restados en UHA-Centro dum unu jaro.

### Japanana Mandatita Insularo en Suda Pacifiko



Inaŭguro de UHA-filio de Queretaro, Meksiko. Filiestro C. Sato sidas en la mezo, unuavice.



# El Malnova Taglibro

## Nov. 1925, antaŭ dek jaroj

— Hidemaru Deguĉi —

**M**i malfermis mian malnovan taglibron de Nov. 1925, antaŭ jardeko. Sub la datoj 14a, 26a kaj 27a estas aldonite la jenaj priskriboj pri miaj pensoj. Mi citas ilin ĉi-sube por mia rememoro, kaj ankaŭ por via lego.



La vivo konsistas en amo. Neniu estas pli soleca kaj mizera, ol kiu eniris en la Spiritan Mondon post soleca vivo en la materia mondo. Eĉ la tiel-nomataj malbonegaj homoj estis ĉirkaŭitaj per varmo de amo post la morto, se al ili ne mankis *amikoj de l' koro*: ili povos trovi konsolon kvamkam ili devos suferi aliflanke.

Tial nenio estas pli granda puno, ol soleco, ne nur en tiu ĉi mondo, sed ankaŭ en la alia.

Plej senkonsolaj estas la homoj sen gustoj. Ni devas atente gustumi la senlime vastan mondon kiel eble plej amplekse kaj profunde. Neesprimeblan ĝuon de intereso oni povas trovi eĉ en filatelo. Eĉ en unuopa folio kaj eĉ en sablero kuŝas la Koro de Dio!

Estas dezirinde, ke ni fariĝu kapablaj trovi intereson en ĉiu afero kaj guston en ĉiu objekto.



Kiamaniere oni akiras Dikredon?

La sento de Dikredo unue ekĝermas en plendoj, malkontentoj, duboj, ktp. kaj oni sentas per sia tuta koro, kiel senforta kaj malgranda estas la *memo* kaj eksopiras sin apogi al forto reale ĉion reganta — Dio! Jen la unua paŝo al Dikredo.

Oni bezonas eĉ longan tempon antaŭ ol

oni konvinkiĝas pri la ekzisto de Dio — nevidebla per la fizikaj okuloj sed reganta en la realeco de la mondo.

Estas tute vane, se oni intencas per homa racio solvi la aferojn de super-racia karaktero, tial jam sufiĉas, se oni nur povis tion rekoni, ke super ni regas Mistera, Vivanta Forto! ĉar Dikredon fortikigas ne teorioj, sed la travivado mem de plej diversaj spertoj!



Antaŭ tre longa tempo vivis famaklerulo. Pro sia instruiteco li estis aroganta kaj ĥavis malbonan kutimon facile kritiki kaj malestimi la aferojn de aliaj personoj.

Unu el liaj amikoj tre bedaŭris tion kaj afable intencis deĉutimigi lin de l' pedanteco. Unu tagon la amiko vizitis lian domon kunportante ovon de birdo en la mano, kaj diris, —

— Sinjoro, ĉu vi scias, kio estas tio?

— Ovo de birdo.

— Jes, vi ne eraras. Vi bone scias.

La klerulo estis iom ofendita sed nenion diris. La amiko diris, —

— Sinjoro, kaj se oni kovos ĝin per varmo, ĝi fariĝos ido, ĉu ne?

— Tute jes.

— Jen, sinjoro, mi donos al vi lecionon: preskaŭ ĉio en la mondo estas pli-malpli ovo! Eĉ bagatelo, kiu aspektas senvalora kaj sentaŭga, tamen povas iam fariĝi *ido de io*, se oni al ĝi donos varmon de konformaj rimedo kaj zorgo!

---

Vi havas bonan ideon? Ne konservu, sed publikigu ĝin en niaj paĝoj!

OOMOTO INTERNACIA

## KORMORANOJ

— J. Major —

Fiŝkaptado per kormoranoj okazis en Japanujo jam en la plej fora antikveco, kiel atestas KOJIKI, la honorinda dokumento de la nacia literaturo.\* En niaj tagoj tiu ĉi pitoreska kutimo postrestas nur je la rivero Nagara, apud la urbo Nagoya, en Meza Japanujo. La alta, simbola, valoro de tiu ĉi originala, japana kutimo manifestiĝas ankaŭ en la fakto, ke grava, nacia ordeno nomiĝas tiu de la Sankta Kormorano. Ĝus reveninta de neforgesebla, nokta ekskurso al la rivero Nagara (multaj nomas ĝin la «Japana Rejno»), mi volas tuj surpaperigi miajn impresojn por ilin transigi al la legantoj de O.I.


La unua neceso al kormorana fiŝkaptado estas kompreneble la... kormoranoj. Tiuj estas sovaĝaj markorvoj kiujn oni ne povas bredi en kaptiteco sed kiujn necesas

\*la Plena Vortaro difinas *Kormorano* per la frazo: «En Ĥinujo oni dresas kormoranojn al fiŝkaptado.» Mi demandas al mi sen sukceso, de kie la kompilintoj de tiu vortaro ĉerpis tiun absurdan difinon.

kapti. La unuan kormoranon oni kaptas per ruzo: oni metas lignan birdon sur la marbordon kaj ŝmiras la ĉirkaŭaĵon per gluo. Kormoranoj estas amikiĝemaj kaj baldaŭ alflugos unu al la ligna birdo... por neniam forflugi libere. Post tio ĉi, la viva birdo servos kiel allogilo kaj oni pli facile kaptos aliajn.

La fiŝkaptistoj bone zorgas pri siaj birdoj. Dum la vintro ili senlabore kuŝas en dometoj ĉar nur somere ili laboras. Estas interese noti, ke la zorgemo de la fiŝkaptistoj estas tiel granda, ke kormoranoj dormas... sub moskito-ŝirmilo!

Post la enkondukaj notoj ni observu la fiŝkaptadon mem. Dolĉe fluas la ondoj de l' rivera akvo en la nokta mallumo. Fiŝkaptado povas okazi nur en malluma, senlunaj noktaj horoj ĉar la fiŝojn oni allogas per torĉoj. La fiŝo kaptata tiamaŭ niere estas la bongusta kaj luksa. Ayu kies esperanta traduko, laŭ la ĉionscia Nova



Fiŝkaptado per kormoranoj.

Vortaro Japana-Esperanta de J. Okamoto estas «plekogloso». Ĉe Gifu, fama urbeto de lanternoj! — larĝa pontego kondukas nin al la transa bordo kie troviĝas Ŝinto-sanktejo, vilaoj de riĉaj komercistoj, multaj gastejoj, boatluejoj kaj unu luksa, moderna hotelo, de kies teraso oni plej bone povas observi la fiŝkaptadon. Aliaj, pli scivolemaj sinjoroj luas boatetojn kiuj plenigas la riveron: ornamitaj de elegantaj paper-aŭ silk-lanternoj el Gifu, ili gracie balanciĝas en la nokta venteto. Aŭdiĝas liuto kaj kanto de geŝoj. ....

Subite vidiĝas la sep ŝipoj de l' fiŝkaptistoj, ŝipoj kiujn oni veturigis per veloj kontraŭ la rapidan fluon kaj nun ili reniĝas al la bazo. Kvar viroj sidas en ĉiu ŝipo, unu el kiuj direktas la ŝipon; je la pruo staras la «kapitano», rekonebla laŭ sia speciala ĉapo. Estas li, kiu direktas dekduon da kormoranoj: ĉiu el la birdoj estas ligita per fadeno kaj naĝas kune kun la ŝipo. Kiam fiŝo allogita de la torĉo alproksimiĝas, iu kormorano rapide enigas la kolon en la akvon kaj kaptas ĝin. Unu alia viro ankaŭ havas kelkajn birdojn por direkti kaj la kvara estas la tamburisto ĉar, strange, la fiŝoj ne volas labori sen bruoj.

La leganto sendube demandas sin pri la sorto de la fiŝo post kiam ĝi malaperas en la birda beko. Nu, la intenco de la kormorano estas kompreneble engluti ĝin. Sed la homa ruzo alimaniere disponis. Speciala ringo estas fiksita sur la kolon de ĉiu birdo, sufiĉe mallarĝa por malhelpi la trapason de granda fiŝo sed sufiĉe larĝa por permesi, ke la birdo nutru sin per fiŝetoj! Kiam birdo kaptis sufiĉe grandan fiŝon, la lerta mastro altiras ĝin per fadeno, elprenas la fiŝon el la beko kaj relasas la birdon en la akvon. Kiam la fiŝkaptita ŝiparo rapide zigzagis antaŭ niaj okuloj sur la rivero, nepriskribeble interesa vido estas tiu ĉi kvazaŭ virtuoza kunagado de homoj kaj birdoj kontraŭ fiŝoj!



La kormorano

Kompreneble kormoranoj estas dresataj al tiu ĉi laboro. Ili vivas ĉ. 20 jarojn en kaptiteco. Tiuj birdoj estas cetere mirinde inteligentaj. Ĉiu el ili konas sian numeron laŭ kiu oni lasas ilin en la akvon. Se oni farus eraron, surdiga protesto leviĝas. Numero I estas la estro de la grupo, ĝenerale la plej maljuna. Tiuj ĉi multmeritan birdon oni metas en la akvon laste kaj oni elprenas lin unue; oni nutras ĝin antaŭ la ceteraj kaj enigas ĝin laste en la korbon, post laboro. Tiu ĉi birdo kvazaŭ konscias pri sia rango ĉar lia konduto estas dignoplena.

Je la fino de la nokta ekspedicio la mastro levas la birdojn el la akvo kaj la pezo de ĉiu el ili malkaŝas kiom ĝi manĝis; se iu birdo estus tro malpeza, oni nutras ĝin per kaptitaj fiŝoj. Verdire, la fino de la fiŝkaptado estas la plej interesa parto, ne nur por la rigardantoj kaj la fiŝkaptistoj, sed sendube por la fiŝoj kaj versajne ankaŭ por la... legantoj!

# Socia Ekonomio

(2)

— Jamato Masaharu —

## II. Intersanĝo kaj Valoro

— Charles GIDE —

Sociekonomio komenciĝas, en la vera senco, kiam la homo vivas en socio. Ĝi estas scienco de sociaj individuoj, ne de izoluloj.

### Pri Intersanĝo

Necesas do almenaŭ du personoj por la estiĝo de ekonomiaj rilatoj. Inter du personoj povas havi lokon tiu grava ekonomia faktó kiu laŭ diversaj aŭtoroj konsistigas la sociekonomion mem: la Intersanĝo.

Ĉu la solulo ne povas fari intersanĝon? Oni povus diri, ke la unuopa homo kiu laboras, intersanĝas siajn klopodon kaj tempon kontraŭ rezultato celita. Oni povas tamen facile kompreni, ke tia pensmaniero estas artifika kaj ekster-ekonomia. «Bonaĵo» — en la ekonomia senco — supozigas duan personon por kiu ĝi estas utila. Tiaj *bonaĵoj* estas do dezirindaj por tiuj personoj kiuj ne posedas ilin.

La plej simpla maniero por la akiro de dezirindaj bonaĵoj estas la ŝtelo. Tiel agas la bestoj. Mi ne aludas al la dombestoj kiuj ŝtelas de la mastro sed al tiuj bestoj kiuj ŝtelas unu de la aliaj: tio estas tre ofta meze de la besta mondo. La osto de l' hundo, la mielo de l' abeloj estas dezirataj de aliaj bestoj kaj por ties akiro ili konas nur la simplan rimedon de ŝtelo.

Ĉe la homoj estis ankaŭ same, komence. Longe antaŭ la apero de komercistoj ekzistis piratoj kaj rabistoj. Kaj eĉ kiam la komercisto aperis, estis malfacile distingi lin de siaj antaŭuloj. Ŝtelo estas do unu

maniero de alproprigo (aŭ eksproprigo, rigardate de alia vidpunkto) kiu estas ennaskita, instinkta, ĉe bestoj. Intersanĝo, kontraŭe, *ne* estas instinkta ago! Temas pri pripensita ago kiu postulas iom da inteligenteco. Efektive, intersanĝo signifas memvolan eksproprigon. Ĉiu eksproprigo estas ofero, malagrabla al la naturo de l' homo. Rigardu infanon kiu fordonas ludilon! Vane oni klarigas al li, ke temas pri intersanĝo — post la ricevo de l' kontraŭvaloro li repostulas la originalan objekton.

Oni povas kompreni la fortecon de la poseda instinkto, se oni meditas pri la eksterordinaraj penoj de la prahomo por la produkto de l' necesajoj. Ili devis esti tre karaj al li. Kompreneble ke li ne volonte senigas sin de ili.

Tial estas, en civilizita socio, ke ni ne emas vendi, eĉ je alta prezo, objektojn kiujn ni amas, ekz. librojn kaj ŝatatajn meblojn.

La *primitiva* intersanĝo nur okazis en esceptaj cirkonstancoj: ekzemple, kiam proponata objekto elvokis en la animo de la ne-posedanto novan kaj neresisteblan deziron (ekz. kiam sovaĝulo kutimiĝinta al pafarko vidas fusilon por la unua fojo). «Mirindaĵoj» kiaj estas fusilo, muzikilo aŭ botelo da alkoholaĵo instigas la afrikan negron senigi sin de io ajn posedata.

Alia okazo de intersanĝo estas kiam iu persono posedas ne necesan kvanton de io por sia propra bezono. Tia intersanĝo okazas ofte inter filatelistoj. Dua poŝt-

marko el la sama speco ne havas valoron por la kolektanto, krom ties intersanĝo-valoro. Sovagulo ankaŭ agas simile. Se li havas du simplajn objektojn, li facile fordonas unu intersanĝe. Sed tiaj feliciaj sovaĝuloj estas malmultaj! Ili estas ĝenerale malriĉegaj kaj intersanĝo apenaŭ okazas inter ili.

Ĉiu bezono de la homo havas limon kiu estas despli rapide atingita ju pli la bezono estas simpla. Soifo estas forigata per unu glaso da akvo kaj cent pluaj glasoj farus neniom da plezuro. Simile estas pri niaj ĉiutagaj manĝaĵoj.

La bezonoj de l' primitivulo estas tiel simplaj ke la limo estas atingebla tre rapide; kiam li posedas tion kio estas necesa, li estas kontenta.

Kiam la bezonoj fariĝas pli rafinitaj, la limo vastiĝas kaj ĝi fariĝas, por tiel diri, elasta. Oni ne povas diri, kiom da juveloj kaj punktoj sufiĉus por kontentigi virinon. Tamen, limo ekzistas.

Ĉe la intersanĝo gravas ankaŭ la antaŭvidemo de l' posedantoj. Kiam bonaĵo ne estas bezonata tuj sed en la estonteco, neantaŭdivema posedanto facile fordonos ĝin intersanĝe. Indigenoj en Alĝerio, Maroko, ktp. malkare fordonas la semojn por la venonta jaro. Oni diras, ke iuj primitivuloj de la Amazono emas fordoni siajn hamakojn por bagatelo — matene sed vespere ili tute ne volas seniĝi de ili. La vespero de la sama tago ŝajnas al ili tiel malproksima kiel la jaro 2000 por ni.

Ni devas noti ankoraŭ unu kondiĉon kiu faciligas la intersanĝon. Temas pri la kazo kie la posedanto obeas al motivo altruisma. Tia sento ne estas privilegio de l' civilizitaj homoj, tute ne. De ĉiuj tempoj kunloĝis en la homa koro Kaino kaj Abelo kaj Abelo ne ĉiam estas mortigata de Kaino, kvankam li ĝenerale dormetadas. Kaj jen la klarigo por la paradoksa konstato, ke en la evoluo de l' ekonomio la donaco estas antaŭa al la intersanĝo t.e. la homo pli facile decidiĝis fordonaci bonaĵojn

ol intersanĝi ilin.\*

Pli supre ni diris, ke la ŝtelo antaŭas la intersanĝon. Ni ĵus vidis, ke ankaŭ la donaco antaŭas ĝin. La homa naturo estas do rehonorigita. Eble estas same eĉ ĉe bestoj. Ili certe scias donaci, almenaŭ en siaj familiaj rilatoj; sufiĉas observi la malavarecon de kokino rilate al siaj idoj kiam ŝi trovas kelkajn grajnoj!

Ĉu reciprokaj donacoj konsistigas intersanĝon? Ne tute, ĉar la intencoj estas malsamaj. La reciproka donaco estas tre ofta ĉe la simplaj popoloj, ja ĝi estas regula; tion pruvas la raportoj de ĉiuj esploristoj de Afriko. Kion ili faras? Kiam ili vizitas tribon, la ĉefo, obee al la reguloj de ĝentileco kaj gastameco de ĉiuj primitivaj gentoj, sendas al ili, laŭ sia riĉeco, bovon aŭ kokinon. Aliparte li atendas reciprokajn donacojn! Same kiel ĉe vizito de fremda suvereno al la franca prezidanto de respubliko, kiam la vizito de l' suvereno estas reciprokata de l' prezidanto kvin minutojn poste. Pro tiu ĉi kialo ĉiu esploristo kunportas aron da objektoj taŭgaj por donacoj aŭ pagoj — kio estos la sama afero.

Sed ni ne devas iri tiel malproksimen. En kelkaj izolitaj lokoj de Eŭropo, kie ne estas hotelo, la sistemo de reciprokaj donacoj funkcias. Mi mem spertis tion antaŭ longa tempo dum vojaĝo en Aragono, Hispanujo. Tio estis en vilaĝeto sen hotelo: kutime oni tranoktas ĉe la paroĥestro. Li gastigas la vojaĝanton, en la nomo de Dio, kompreneble, sed estus tre malĝentile se oni ne farus almenaŭ egalvaloran donacon la sekvan maĵenon.

La romia juro difinas la *intersanĝon* jene: DO UT ES, t.e. donaco kontraŭ donaco. Jen kio konfirmas la ĉi-suprajn. Estas cetere agrable konscii, ke la intersanĝo originas ankaŭ de la donaco kaj ne nur de

\* En tiu ĉi punkto renkontiĝas la ŝajne materialisma sociekonomio de Gide kun la spiritalisma mondkomprono kiu ĉiam akcentas altruismon, sinoferon kaj bonecon tiel en la homa kiel en la besta kaj eĉ en la neorgana mondoj.

la ŝtelo! Kaj la momento kiam la interŝanĝo estis universale agnoskata, estas solena momento en la historio de l' civilizo.

### *Pri Valoro*

Laŭ tio kion ni diris pli supre, ĉiu posedaĵo havas duoblan karakteron: unue ĝi estas *bonaĵo* kapabla kontentigi bezonojn kaj due ĝi estas objekto de interŝanĝo t.e. ĝi permesas al la posedanto havigi al si ĉu alian aĵon, ĉu la laboron de aliaj personoj.

Kun la kresko de la civilizo la dua karaktero tendencas pligraviĝi.

Por tion kompreni ni konsideru la rolon de tia grava bonaĵo kia estas la grajnoj en primitiva socio. La grajnoj servas por la ĉiutaga bezono de la posedanto kaj krome ili estas interŝanĝeblaj. La malsatantoj volonte donos sian laboron por ricevi grenojn. Posedo signifas do potencon. Tiu ĉi potenco — kiu regas en la ekonomio — estas nomata *valoro*.

Valoro supozigas do interŝanĝon. Se oni volas uzi tiun ĉi terminon por la relativa graveco kiun havas iu bonaĵo por la posedanto mem, oni devas zorge aldoni epiteton, t.e. oni diros «uz-valoro». Aliparte, esprimo kia estas «interŝanĝa-valoro» estas pleonasma. Uz-valoro estiĝas en okazo de okulvitroj aŭ ligno-gambo kiuj estas tre «valoraj» por la posedanto sed senvaloraj por ĉiu alia persono.

Kvankam la vorto «valoro» estas ofte misuzata, ĝi klare signifas *aĉetpovon* t.e. ĝia grado dependas ne de la posedanto sed de la eventualaj akirantoj kiuj pli-malpli deziras akiri al si la posedaĵon. Ju pli granda estas la deziro ĉe tiuj personoj, despli alta la valoro. Hundo faros kian ajn akrobataĵon por ricevi pecon da sukero. Simile estas pri homoj. La valoro naskiĝas do el la deziro de aliaj uloj.

Ŝajnas do kvazaŭ la ekonomia valoro estas iagrade malmorala. Efektive, ekonomia valoro supozigas spekulacion al la de-

ziro de niaj kunfratoj, tute malsame estas pri moralaj valoroj, kiuj estas senpagaj kaj krome la posedanto ne suferas por ilia for-dono.\*

### *Pri komerco*

La primitiva interŝanĝo estis izola fenomeno. Regula interŝanĝo, t.e. *komerco* necesigas serion da etapoj, kiujn ni rapide notos.

Antaŭ ĉio oni devas venki la infanecan deziron konservi por ĉiam siajn posedaĵojn. Tia deziro aŭtomate malaperas, kiam oni produktas bonaĵon ne kun la celo ke oni ilin konservos por si mem sed kontraŭe, *kun la celo ke oni ilin donos al aliaj personoj*. Kiam homo laboras ne nur kun la intenco kontentigi siajn porprajn bezonojn sed ankaŭ tiujn de siaj kunhomoj, oni diras, ke li havas *metion* aŭ *profesion*. Meti-profesio estas do kvazaŭ ĉirkaŭira vojo por la vivsubteno. La primitivulo laboras nur por si; por siaj propraj pano, vestaĵoj, ktp. La civilizulo ofte laboras por celoj kiuj lin mem ne interesus persone sed kies plenumo permesas al li la kontentigon de siaj propraj bezonoj personaj; multe pli facile ol se li volus tion fari rekte.

Oni ankaŭ nomas la ĉi-supran aferon «labor-divido». Same kiel la «leĝo de l' malplej granda peno», kies sekvo ĝi ja estas, la leĝo de «labor-divido» konsistigas la fundamenton mem de la ekonomia scienco, ankaŭ tiun de la sociologio cetera.

La metioj elformiĝis iom-post-iom; ili originas en la t.n. hejma ekonomio t.e. en la familia sistemo kie familio produktis ĉion necesan por sia subteno. Ne necesas do reiri al antaŭhistoriaj tempoj por esplo-

\* Simile estas ankaŭ pri materiaj valoroj, la ekonomia krizo tutmonda tion ŝajnas pruvi. Efektive, la mondo suferas por troa produkto kaj bonkora fordonado de la troaj bonaĵoj efektive pliriĝigas eĉ la posedantojn. Tiel oni komprenas pli kaj pli la grandiozecon de la Mond-familia Sistemo de majstro O. Deguči.

ri la naskiĝon de l' metioj; en multaj familioj eĉ hodiaŭ oni bakas panon, lavas tolaĵojn, ktp. ktp. Iom post iom aperas profesiaj panisto, lavisto, k.a. Antaŭ ne longe oni ŝpinis dome; hodiaŭ ŝpinado estas unu el la plej grandaj industrioj.

Tiel, laŭgrade, la metioj eliris el la mastrumado privata kaj ĉiu el ili produktadas por interŝanĝo. La granda komplikeco de tiu ĉi produktmaniero necesigas specialajn perantojn, la *komercistoj* kiuj ludas eminentan rolon en la civilizo: la komercistoj de la eŭropa-klasika antikveco, tiuj de l' okcidenta mezepoko popoligis, kolonigis, kulturis, riĉigis sed ankaŭ per-

versigis la Okcidenton.

La komercisto aperis sub tre simpla formo, videbla ankoraŭ hodiaŭ en vilaĝoj: la kolportisto, kiu portas siajn varojn sur sia dorso aŭ per venturileto de vilaĝo al vilaĝo, malpakas kaj laŭte proponas ilin al eblaj aĉetantoj. Necesis granda progreso de la kolportisto ĝis la Ĉionvendejo\* kaj al la makleristo kiu havas nek vendejon, nek varojn kaj faras sian tutan negocon per korespondo. Sed, la pioniroj de l' komerco estis herooj, dum ili estas simplaj profituloj.

\* japana neologismo por la Usona «Department Store.»

## JAPANUJO

(EL «VOJAĜLIBRO» DE FILOZOFO) (12)

— Grafo H. Keyserling —

### NIKKO

**S**ed estas grandeco en Japanujo, post ĉio. La scenaro de Nikko, kun siaj kru-taj rokoj, siaj ŝaŭmantaj akvofaloj, siaj gigantaj abioj kaj cedroj, estas grandioza; kaj ĝi elvokas tiun efekton ĉefe ĉar ĝi liveras la kadrojn por strange potenca manifestiĝo de homeco. En la *Iejasu*-templo estas spirito de grandeco, kian mi ne sentis ekde *Pekingo*.

*Iejasu*, la fondinto de *Tokugaŭna Dinastio*, kiu determinis la destinon de tiu ĉi lando por pli ol du kaj duonjarcentoj sub la kvazaŭ-suvereneco de Mikadoj, estis potenculo komparebla al la plej potencaj el ĉiu parto de l' tero. Kaj same kiel kvanteca ŝanĝo kaŭzas kvalitan ŝanĝon en la tuta Naturo, tiel la japana tipo de reganto spertis radikalan metamorfozon en li: estis nek aŭreolo de l' mitologio, nek kortega prestiĝo, nek denaska privilegio, nek inteligento, nek forta brako, kiu donis fonon por tiu ĉi potenco — ĝi estis tiu vera supereco de l' naskita reganto kiu, kvan-

kam ĉion en si mem tenanta, tamen tute elstaras super ĝi; tiu esenca majesto, kiu distingas ĉiujn tre grandajn reĝojn. *Iejasu* postlasis tiun ĉi spiriton kiel heredaĵon por siaj posteuloj; tiu ĉi spirito ankoraŭ regadas en *Nikko*, super la monumentaj tomboj de l' *Tokugaŭna-idoj* kaj iliaj vasaloj, kreante psikan atmosferon ekzistantan en neniu alia parto de Japanujo.

Estas mirinde, ke tiu ĉi unu homo kapablis krei tipon kiu, kompare al ĉiu alia manifestiĝo de l' japana spirito, ŝajnas aparteni al alia dimensio! Kaj estas mirinde, super ĉio, ke tiu ĉi tipo daŭradis. Mi konas neniun pli impresigan ekzemplon pri tio kiom decidaj povas esti la kadroj de iu bildo rilate al ĝia karaktero. Diversaj formoj estas liberigataj en la homo laŭ lia ekstera pozicio: la principo de l' vivo modifas sian aperon laŭ la oportuneco por sinesprimo. Prestiĝo, potenco, riĉeco, fidela admiro flanke de subuloj, estas egala nombro da formantaj fortoj kiuj kulturis kaj edukas la animon kaj ofte kaŭzas radikalan metamorfozon de hodiaŭ al morgaŭ.

Tiu ĉi aferstato estas agnoskata de l' populara legendo en la diro: Dio donas inteligentecon al kiu Li donas oficon. Sed tiu ĉi diro flankenlasas unu aferon: ke ne ĉiu kapablas, kiom ajn da inteligento li havas, plenigi ĉiun oficon bone. La decida faktoro estas la vivanta spirito, kiu utiligas la inteligenton, kaj tiu ĉi faktoro estas konstanta elemento en ĉiu, kapabla kreski nur en maloftaj esceptoj. La spirito laŭ kiu iu homo estis edukata regas lin ĝenerale ĝis la fino. Jen estas la vera signifo de l' ideo pri legitimeco, kaj ankaŭ pri la malfido de la *homo novus*: por unu *Ijesasu*, unu *Acoka*, unu *Napoleono*, estas miloj da talentaj strebuloj, kiuj ne taŭgas por sia nova ofico. Por plene ekspluati la fortojn, kiujn pozicio de reganto povas liberigi en ĉiu, tiu ĉi pozicio devas esti akceptata kiel natura afero. La konscio de reganto devas koincidi kun la normala konscio. Fidi sin ĝis tiu grado, kiu postulas, ke oni traktu kiel naturan aferon tion, kio nur ĵus estis nekonceptebla, estas donate nur al maloftaj geniuloj. Tio ĉi donas al la homo naskita al iu pozicio absolutan avantaĝon super la strebulo, tio ĉi donas al sensignifa hereda reĝo plian superecon kontraŭ eminenta parvenuo. Dum mia vivo mi zorge studadis la mensostaton de la diversaj homtipoj kun kiuj la hazardo interrilatigis min: regantaj princoj, ŝtatistoj, financaj magnatoj, famiĝintaj talentuloj; en la kazo de ĉiuj tiuj naskitaj por potenco kaj ne degenero, mi renkontis normalan konscistaton kiu, kvankam atingebla de ordinara mortemulo, estas neniam normala por li, kaj tiu ĉi konscio implicas absolutan superecon. Tio ĉi ankaŭ havas, nature, sian specifan limon; kie la kadroj ne korespondas al la bildo, kiel okazas pli kaj pli hodiaŭ, supereco alprenas la aspekton de malsupereco. Sed la alvokiĝo\* de l' naskita reganto al regado tamen estas tiel frapanta ke mi ofte demandis min kun mirego kiel la homaro povas esti sufiĉe blinda por deziri la ĉesi-

gon de l' regant-edukado, dum ĝi bredas kursĉevalojn kaj melkbovinojn. † La kontraŭpruvo kondukas al la sama rezultato; kiam ajn mi havis la okazon observi la famiĝon de gravulo, mi povis, antaŭ ĉio, ĉiam observi internan kreskon; lia propra memo trovis pli kaj pli da esprimridemoj. Sed tuj kiam la larĝiĝo de l' kadroj atingis trans iun certan krizan punkton, kiu estis proksima aŭ fora laŭ lia kalibro, li subite refariĝis malgranda; la rimedoj kreskis pli ol la homo. La limo al tia sensacia kresko estas la karikaturo pri la parvenuo. *Ijesasu* levis sian familion al pozicio kiu estis unika laŭ graveco en tuta Japanujo. Li mem estis unu el la malmultaj aspirantoj kiu estis antaŭdestinita, ne nur kreski, sed vivadi sur la altaĵoj. Li postlasis al siaj heredantoj la kadrojn kiujn li konstruis por sia propra vivo. Kaj tiuj ĉi kadroj montris tiom da formopotenco ke la ŝogunoj\*\* posedis dum du cent jaroj pli grandan stilon ol iu japano antaŭ aŭ post ili; kaj eĉ hodiaŭ la spirito de ilia grandeco ankoraŭ ŝvebadas super iliaj tomboj.

\* alvokiĝo: zamenhofs esprimo por la angla «vocation»

\*\* regantoj (sub la Imperiestro)

«Hebrea profeto diris, ke post la milito *Har-Magedon*' venos la mondo-fino. Al mi ŝajnas, ke tiu fino de la mondo jen proksimiĝas, ĉar diversaj okazaĵoj malfeliĉaj tion atestas: blovas frosta vento dum sezono somera, ne bone kreskas vegetaĵoj sur la kampoj, tertremegoj kaj inundoj sinsekve minacas la homojn, perfortuloj kaj rabistoj triumfe rajdas sur la stratoj, furiozas danĝeraj movadoj... ĉi ĉio estas la antaŭsigno de la proksimiĝanta mondomo. El tiu ĉi mizera stato povas savi la homaron neniu alia homo ol la Savanto.»

**Onisabro Deguĉi** (fragmento el  
«*Kio estas Oomoto*» 5a eldono)



# Reĝo kiu havis Dendoloron

[Rakonto por infanoj]

**A**ntaŭ longaj jaroj vivis Reĝo, kiu estis tre malbonhumora. Liaj vasaloj multe timis lin, kaj neniu povis esti feliĉa kie la Reĝo estis. Ĉiu el la vasaloj devis fari tion, kion la Reĝo volas, kaj neniu povis fari ĝuste tion kion ili volas por si mem. Vi povas esti certa ke la Reĝo ne estis amata kaj kompreneble li ne estis feliĉa, ĉar neniu povas vivi en feliĉo sen amo.

Vi iam kantis — aŭ eble vi aŭdis iun kanti — himnon kiu diras: «Dio agas en mistera maniero por plenumi siajn miraklojn.» Tio signifas ke Dio ofte uzas rimedon, kiun ni ne uzus por ke io fariĝu. Ankaŭ tio okazis ĉe l' Reĝo, kiu havis dendoloron. Dio amas uzi malgrandan kaj modestan aferon sur la tero por montri Sian Volon. Nun dendoloro de l' Reĝo estis tiel terura ke la kortega kuracisto ne povis kuraci ĝin. «Detranĉu al li la kapon!» la Reĝo kriegis, «se li ne povus kuraci min, kio estas lia utilo?» Ĉiuj vasaloj sentis grandan timon ĉar neniu sciis kio sekvas pro malbonhumoro de l' Reĝo.

«Mi provos endormiĝi» la Reĝo diris, «En la dormoĉambro regu perfekta senbrueco kaj se iu ajn faros bruon, detranĉu al li la kapon». La Reĝo enlitiĝis kaj du vasaloj devis stari ĉe la piedoj de l' lito por gardi ke nenio ĝenu lian dormadon. Neniu sono krevis la silenton kaj la vasaloj pensis ke la Reĝo endormiĝis kaj ili povis libere ekspiri; sed subite la Reĝo eksaltis kaj kriis, «Kio estas tiu bruo?» «Nia Reĝa Moŝto, ni ne povas aŭdi ion ajn» respondis timigitaj vasaloj. «Mi aŭdas flugadon», kriegis la Reĝo, «Vidu, kio estas?» Ambaŭ vasaloj ĉirkaŭrigardis kaj unu el ili vidis grandan noktpapilion sur vitro de l' fenestro. «Jen estas la bruo, kiu min ĝenis!»,

diris la Reĝo, «Detranĉu al ĝi la kapon.» Ili kaptis la malfeliĉan noktpapilion kaj ĝin mortigis kaj la Reĝo denove enlitiĝis.

Sed la dendoloro de l' Reĝo senĉese multiĝis, kio timigis la vasalojn pli kaj pli, ĉar ili ne scias en kiu momento la Reĝo ordonos al ili la senkapigon. Sed baldaŭ la Reĝo pli trankviliĝis kaj la vasaloj pensis ke la Reĝo nunfoje endormiĝis. Sed ne, — la Reĝo denove eksaltis «Kio estas la bruo?» li diris. «Nia Reĝa Moŝto, tio estas vermo rampanta en la ĝardeno.» «Venigu ĝin al mi ĉar mi mem mortigos ĝin» la Reĝo ordonis. «Mi vidu ĉu mi ankoraŭ estos ĝenata mortiginte ĝin!» — kaj ĝuste tiam, kiam li parolis, li havis speciale teruran kaj tordigan dendoloron kiu faris lin pli incitigema ol antaŭe.

Envenis la vasaloj kun granda vermo grasa sur arĝenta pleto kaj kiam la Reĝo vidis ĝin, li intencis ĝin motigi, je lia surprizo la vermo ekparolis: «Vi venigis min, Via Reĝa Moŝto; kion mi servos por vi?» «Ĉu servi al mi?» la Reĝo kriegis, «mi volas mortigi vin, pro via aŭdaco fari bruon en mia ĝardeno kiam mi ordonis ke ĉiuj estu en silento». «Sed mi nur plenumis mian laboron» diris la vermo. «Laboro? En kia laboro vi okupis? Vi estas nur veneno en la ĝardeno kaj viaj tutaj familianoj devas esti mortigataj.» «Oh, pardonu min, mia Reĝa Moŝto, mi prenis sur min la laboron kiun Dio donis al mi. Se mi ne estus kaj miaj familianoj, vi ne povus havi dolĉan frukton kiel ĉi tiuj ĉarmaj vinberoj sur via tablo. Vi povus havi nenian vegetaĵon aŭ floron ĉar ili nur kreskas pro mia laboro, donita al ni de Dio por ke vi havu ĉiujn belajn aferojn.»

Nun la Reĝo sentis intereson kaj diris: «Efektive mi ne sciis tion kaj mi pensis ke vi difektas aferojn en la ĝardeno. Nun parolu al mi kio estas via laboro kiun vi

okupas.» «Mi faras tunelon en la tero por ke lumo kaj aero kaj sunvarmo atingu ĝis radikoj, por ke pluvo rekte eniru en la teron kaj arboj — ekzemple tiu vinberujo sur kiu kreskas via ŝatata vinbero — provizu sunvarmon kaj pluvon por estonta uzo. Sen mi la tero ne povas esti fortika kaj arboj kaj vegetaĵoj devus morti. Tio estis la laboro, en kiu mi okupiĝis kiam viaj vasaloj venis por alporti min al vi.»

«Kiom multe interesas min!» diris la Reĝo, «Certe mi savos vian vivon; ankoraŭ parolu al mi antaŭ via foriro, kara vermo, kiamaniere vi aranĝas kiam la ĝardenisto fosas kaj ofte tranĉas vin en du partojn per lia fosilo? Kredeble granda nombro da viaj familianoj estas mortigataj?» «Ne tiel multe kiel vi opinias, mia Reĝa Moŝto; Dio provizis por ĉiuj vermoj tri korojn, tiel ke se ni tranĉigos en du aŭ eĉ en tri, ĉiu parto denove ekvivos kaj fariĝos nova vermo.» «Ĉu ankaŭ tio estas vera ke vi estas blinda?» demandis la Reĝo. «Jes, ni ne bezonas havi okulojn kiel vi», respondis la kara vermo, «sed la fronto de niaj kapoj estas tiel sentemaj ke tiuj servas la saman taskon kiel okuloj kapablas.»

«Koregan dankon, kara vermo, pro via afabla rakonto por mi», diris la Reĝo, «vi estas la sola kiu ne estis timigita de mi. Vi instruis al mi vere utilan lecionon, kaj denun mi ordonos ke neniu el viaj familianoj estu mortigata!» Je sia surprizo la Reĝo trovis sian dentdoloron perfekte foririnta. *El «Greater World» Trad. T. Kami*

### Ĉu vera religio povas esti nacia?

Ne, kaj neniel!

Ĉar ekzistas nur unu vera Dio por la tuta homaro, do por ĉiuj nacioj, kaj ĉar la vera religio servas al la vera Dio, ĝi neniel povas esti nacia.

Nacia religio kaj naciaj pastroj estas nur bonaj helpiloj, por ŝtataj interesoj, sed neniam reprezentantoj kaj servantoj de vera Dio.

Kiel malprudente kaj krime agas do la

pastroj, se ili benas la kanonojn de sia nacio kaj preĝas pereon de la malamiko!

Ĉu tia ago estas ebla ĉe la Oomoto-pastroj? Neniam kaj neniel! Ĉar *Oomoto estas vere internacia* kaj tial ne povas protekti nur certajn naciojn kaj malbeni la aliajn.

Do, karaj legantoj, bone pripensu tion, ekzameni senpartie la konduton kaj agojn de viaj pastroj kaj decidu la veran religion, ĉar nur tiam la homaro povas esti savita kaj senreste feliĉa, kiam ekzistas nur unu vera religio, kiu kunigos ĉiujn naciojn por la tutmonda paco kaj bono!

*Kreibich Emil, Ĉeĥoslovakujo.*

### «JAPANUJO», nova Esperanta gvidlibro.

Ĝus aperis la dua eldono de Japana gvidlibro, eldonita de Ministerio de l' Ŝtatfervojo. Ĝi koncize konigas pri japanaj vivo, vidindaĵoj, vojaĝoj, ktp. sur 20 paĝoj da belaj esp-tekstoj kun riĉaj ilustraĵoj. Formato 21×23cm. Oni povas senpage ricevi ĝin ĉe: Kokusai-Kankookjoku, Fervoja Ministerio, Marunouĉi, Koozimaĉi, Tokio.



# La Akademio kaj Ni

Antaŭ ĉio ni altiras la atenton de niaj afablaj legantoj al la sekvantaj tri artikoloj aperintaj en nia gazeto:

1) «El la Batalfronto de l' Fundamentanoj» (junio, paĝo 19)

2) «Nia Vidpunkto» (julio, paĝo 3)

3) «El la Batalfronto de l' Fundamentanoj» (aŭgusto, paĝo 27).

Se oni volas objektivite juĝi pri nia sinteno, oni devas legi, aŭ re-legi, tiujn tri artikolojn antaŭ ĉio.

Kiam ni publikigis la diritajn artikolojn, ni antaŭvidis protestojn; ni eĉ deziris protestojn, ĉar nur per senkaŝa diskutado pri kontraŭaj vidpunktoj povas naskiĝi honestaj konvinkoj en Esperantujo. Ni konfesas tamen, ke ni ne antaŭvidis, ke la kontraŭdiro venos de la Akademio mem, t.e. de ĝia Prezidanto kaj de la Direktoro de la Sekcio por la Komuna Vortaro. Fakte, ni estas kontentaj, ke la voĉo de nia modesta gazeto estis sufiĉe potenca por elvoki tiajn eminentajn kontraŭdirojn kaj kompreneble ni volonte publikigas la du leterojn ricevitajn kiel respondo al nia unua artikolo ĉi-supre menciita. Konforme al nia ĝisnuna kutimo ni permesos al ni aldoni kelkajn rimarkojn al la kritikoj ricevitaj, ĉu sub asterisko, ĉu epilogue kaj ni sincere esperas, ke oni ne miskomprenos nian intencon.

Estimataj Sinjoroj,

En la ĵus ricevita numero de Oomoto, mi legis leteron de S-ro Fischer pri la oficialigitaj vortoj, kun antaŭa teksto subskribita de la Redakcio, kaj per kiu estas forte kritikata la Lingva Komitato.

Kiel Prezidanto mi protestas kontraŭ tiu publikigado.

Unue ĉu ne estus lojale sciigi min pri via intenco publikigi tiun cirkuleron, petante, ke mi konigu la motivojn pro kiuj la Lingva Komitato alprenis sian decidon; tio ankaŭ estus dezirinde por ke viaj legantoj, per sciigo de la por- kaj kontraŭ-

argumentoj, povu opinii kun sufiĉa kono de la demando.<sup>①</sup>

Mi ankaŭ protestas kontraŭ la formo de viaj kritikoj, en kiuj mi ne trovis la fame konatan ĝentilecon kaj afablecon de via nacio.<sup>②</sup> Vi kulpigas la L.K.-anojn pri difektigo de la lingvo: ĉar evidente ili ne tion faris intence, ili do estas aŭ mallertaj aŭ indiferecentaj: ĉiukaze ili ne faris sian devon. Via malaprobado de la oficialigitaj vortoj ne pravigas tiel ofendan opinionon, ĉar mi kuraĝas pensi, ke S-ro Fischer kaj vi ne estas pli lertaj ol la du trionoj de la Lingva Komitato.<sup>③</sup>

Mi ankaŭ miras pri la publikigado de la letero Fischer, ĉar ĝis nun via gazeto publikigis neniun el la cirkuleroj de la Akademio senditajn al ĝi, kiel al ĉiuj esperantaj gazetoj, kun *peto represi*.<sup>④</sup>

Mi ne insistus pri tiu afero, se, en ĝi, mi ne vidus danĝeron por nia movado en via lando. Anstataŭ klopodi por komprenigi al viaj samnaciuloj, la nunan evoluon de nia lingvo, kiun gvidas la Akademio, laŭ la vojo montrita de Zamenhof (ĉar ĉiuj oficialigitaj vortoj estas *zamenhofaj*), vi instigas ilin kontraŭ oficialigo de vortoj, eble ne necesaj por la ĉiutaga uzado, sed certe utilaj por la intelektaj kaj literaturaj verkoj, ekzemple *tradukoj per kiuj, estas diskonigitaj la defverkoj de la japana literaturo*.<sup>⑤</sup> Ĉu ne estus utile, ke vi, kontraŭe, klarigu al ili, ke oficialigo de tiuj vortoj, tute ne komplikigas la lernadon de la lingvo, kaj ĝian uzon por la esperantistoj, kiuj ne verkas literaturajojn, ĉar sufiĉas, ke ili lernu la vortojn, kiujn ili bezonas, kaj se, en publikigaĵo, ili hazarde trovas vorton nekonatan kaj ne troveblan en la vortaro, kiun ili posedas, ili pensu, ke tiu malgranda ĝeno estas necesa por ke nia lingvo fariĝu kapabla ludi sian rolon de helpa lingvo en ĉiuj fakoj.<sup>⑥</sup>

Fine vi ankaŭ devus komprenigi al ili, ke se ĉiujare aperas kelkaj oficialigitaj vortoj, anstataŭ post longaj intertempoj, kiel antaŭe, la kaŭzo estas, ke, al ĉiu vorto prezentata al la LK-anoj estas aldonataj kelkaj sciigoj — kio ne estis farata por la antaŭaj aldonoj, kaj estis postulata de la LK-anoj — pro tio estas neeble prezenti samtempe centojn da vortoj, kiel antaŭe. Sciigu ankaŭ, ke oficialigo de dudek vortoj ĉiujare ne pli komplikigas la lingvon ol oficialigo de cent aŭ du cent vortoj

kvin-aŭ-sesjare, kaj ebligas pli atentan studon de la ekzamenantoj.

Mi ne postulas presadon de tiu letero. Mi fidas vian senpartiecon kaj samideanecon, por konsenti pri tiu defendo de la esperantaj Lingvaj Institucioj.⑦

Samideane via

Rollet de l' Isle

P.S. S-ro Bailey, direktoro de la Akademia Sekcio «Komuna Vortaro» ankaŭ respondos vian artikolon.

\* \* \*

Caernarvovshire, Kimrujo, Britujo.

26. Junio, 1935.

Estimata redaktoro,

En via artikolo «el la Batalfronto de l' Fundamentanoj» vi esprimis aprobon de la cirkulero de s-ro Henriko Fischer, per kiu li protestis kontraŭ la enkonduko de «necesaj novaj vortoj» en nian lingvon. Tute prava estus lia protesto, se li ĝin direktus kontraŭ vortoj efektive necesaj kaj novaj; sed la listo prezentita al la Lingva Komitato por la Sesa Aldono konsistas ekskluzive el vortoj uzitaj de d-ro Zamenhof, kiu mortis antaŭ 18<sup>3</sup>/<sub>4</sub> jaroj! Sekve tiuj vortoj ne estas novaj. Koncerne la demandon, ĉu ili estas necesaj, ekzistas kompreneble diversaj opinioj; tamen mi pensas, ke la opinio de la aŭtoro de nia lingvo devas havi por ĉiu Esperantisto konsiderindan aŭtoritatecon. Li certe ne estis amanto de «superflua balasto», tamen li uzis tiujn 25 vortojn; supozeble do li opiniis, ke ili ne estas «necesaj». El tiuj 25 vortoj la Lingva Komitato elektis 21 por oficialigo.⑧ En tiu elekto mi ne povas vidi ion, kio ne estus «fidela al la noblaj idealoj de nia Majstro Zamenhof».

Akceptu amikan saluton de via fervora kolego,

William Bailey

Direktoro de la sekcio por la komuna vortaro.

(1) Tia opinio ŝajnas al ni tro arbitrema, precipe ĉar ĝi venas el Francujo, lando de tradicie libera publika opinio. Ĉu la kritikantoj de la Franca Akademio konsultas la Akademion mem antaŭ ol publikigi siajn kritikojn? Ĉu la Prezidanto de la Franca Akademio persone respondas al kritikintoj? Sinjoro Rollet de l' Isle certe konsentos kun rideto, ke tia afero estus neimagebla sed li aldonos, sendube, ke oni

ne povas kompari la Francan Akademion al la Esperantista Akademio. Ni tamen demandas, kial ne? Ĉu ne, laŭ la opinio de la plej eminentaj pioniroj de Esperanto, oni devas trakti nian lingvon same kiel oni traktas sian nacilingvon? Se ni do traktis la Esperantistan Akademion same kiel francoj traktas la Francan Akademion (hispanoj la Hispanan Akademion aŭ japanoj la Japanan Akademion), ni pensas, ke ni nur elmontris nian altan estimon al nia Akademio. Ni diras «nia», ĉar Esperanto estas internacia lingvo apartenanta al la tuta homaro kaj ĉiu en nia Movado estas egala. Konsekvence, bonvolu kompreni, ke ĉe ni ne estis *intenco de ofendo*. Se ni-aj vortoj estis mallertaj, ni petas pardonon.

(2) PLI FORTA OL ĈIU PERFORTO ESTAS CEDEMA SPIRITO; BONECO VENKIS «LA MONDON.» Tiel skribis Herder, la germana poeto, laŭ cito el «Nia Gazeto» (junio). Sed afablecon oni ne konfuzu kun cedemo. Veraj japanoj parolas nur post pripenso kaj ili cedas malfacile, ĉar ili estas sinceraj en sia konvinko. La diplomatoj de Japanujo, el la malnova skolo, donis tamen al la mondo falsan impreson pri la nacia karaktero. Tio okazis pro lingvaj malfacilaĵoj. La ĝentilan rideton oni tro ofte komprenis kiel principan cedon. MATUOKA en Ĝenevo elmontris fine pli veran vizaĝon de japana diplomatio kaj li havis tian triumfan revenon kian neniu diplomato ankoraŭ ricevis.

Oni demandas al si, kial ni politikas. Nu, tial: Okcidentaj samideanoj bonvolu fine kompreni, ke nia Esperanto, kvankam pli facila ol la angla lingvo, estas tamen sufiĉe malfacila por orientanoj, kiuj estas kondamnitaj kvazaŭ al dua rango, *sub* eŭropanoj. Oni povas malgrandigi tiun diferencon aŭ oni povas ĝin grandigi. Se oni aldonas multajn neologismojn kaj se oni lasas nian Gramatikon kaj Stilistikon en

anarĥio, tiam oni pligrandigas la diferencon inter orienta, japana Esperanto kaj okcidenta, eŭropa (t.n. «internacia») Esperanto. Ŝajnas al ni, ke la Esperantista Akademio alprenis tiun lastan programon. Ne ĉiam estis tiel. Oni bone memoras la tradicion de profesoro T. Cart, kiu estis nia tre bona amiko. Li diris: *Ni fosu nian sulkon*. Tio signifas: Ni eluzu la trezorojn de la Fundamento, ni kristaligu la Gramatikon, la Stilon, antaŭ ol akumuli balaston da novaj vortoj diskuteblaj. Prof. Grosjean-Maupin sekvis tiun noblan tradicion. Li skribis al ni ofte, aprobis nian stilon kaj eĉ deklaris, ke li utiligas niajn kritikojn ĉe la eldono de la Plena Vortaro, dua eldono. Tia akcepto de kritiko ŝajnas al ni altestiminda. Sinjoro Rollet de l' Isle, ĉu vi povas diri publike, manon je via koro, ke vi ankaŭ sekvas la grandan tradicion de la Akademio? Se jes, ni solene retiros nian akuzon: ni kredos vian vorton, ni helpos vin. Se ni ĉiuj estas Fundamentanoj, ni devas kunlabori.

(3) En aferoj intelektaj, t.e. spiritaj, *plimulto* ne nepre pravas. Ĉiukaze, eĉ en ordinaraĵoj, politikaj aferoj oni ĝenerale permesas, ke la opinio de la malplimulto estu publikigata (krom en landoj terorisme regataj kaj nia Esperantujo ne devas esti tia!). Sinjoro FISCHER estas cetere mem Akademiano kaj ni ne vidas, kiel ni ne rajtus publikigi lian cirkuleron, **riĉe dokumentitan de argumentoj**. Se la Akademio, aŭ ĝia Prezidanto malkonsentas, ni estas same volontege pretaj publikigi kontraŭajn argumentojn ĉar gazeto devas esti neŭtrala tribuno de publika opinio por la informado de la publiko. Sinjoro Prezidanto, ni senpacience atendas viajn *argumentojn* kaj nia gazeto ilin bonvenigos.

(4) En nia aŭgusta numero oni trovas cetere ankaŭ cirkuleron de la Akademio represitan. Kompreneble, kiam cirkuleroj ne havas specialan intereson por ni, ni ne ilin publikigas. Sed de nun, se nia Akademio

deziras, ni volonte publikigos regule ĝiajn cirkulerojn, ĉar finfine nia Akademio meritas plej vastan publikan atenton, ni kredas. Esperanto estas ĉefe lingvo, oni do atentu pri la lingva flanko kiel eble plej multe.

(5) Ni petas sinjoron Prezidanton, ke li bonvolu doni al ni praktikajn ekzemplojn pri tiu ĉi punkto. Ŝajnas al ni, ke la Esperanta vortaro estas sufiĉe malriĉa en radikoj ĉefe utilaj por la traduko de japanaj esprimoj. Tamen, ni ne postulas amasan enkondukon de novaj vortoj *al ni* utilaj, tio estus egoisma. Sed same egoisme estas kiam la eŭropanoj konstante postulas nuancojn necesajn al la traduko de *ĉiunaciaj* literaturaĵoj. Eĉ nacilingvoj ne havas *ĉiujn* bonaĵojn kunigitajn, kiel do nia Esperanto kunigus ĉiujn eblecojn de ĉiuj lingvoj? Ni devas limigi la riĉigon de nia lingvo.

(6) Sperto montras, ke Esperanto estas jam sufiĉe malfacila en sia nuna formo. Nur eta proporcio de la Esperantistoj majstras la lingvon. Galicismojn oni trovas ja eĉ en la akademaj cirkuleroj; eraretoj enŝoviĝis en la vort-difinojn (vidu la artikolon de sinjoro Grenkamp-Kornfeld ĉi-sube), ktp. Koncerne al Japanujo, nia Movado sufiĉe prosperas tie ĉi sed la kvalito de la esperantistaro ne estas kontentiga, pro la malfacileco de la lingvo. Plej bona pruvo estas por tio la fakto, ke kvankam Japanujo en ĉiuj fakoj de civilizo kaj kulturo faris grandiozan progreson kaj partoprenas la tutmondan konkurson, en Esperanto ĝi ankoraŭ ne produktis eĉ unu mondfaman verkiston. La manko devas kuŝi do en Esperanto, t.e. en ĝia nuna formo. Estas nia konvinko, ke necesas sistemigi, ordigi kaj klarigi vortaron, gramatikon, stilistikon kaj dum almenaŭ dek jaroj necesas haltigi la oficialan enkondukon de novaj radikoj. Tio estas ankaŭ la opinio de Julio Baghy, viro inda je aŭskulto.

(7) Por montri nian senpartiecon, ni vo-

lonte publikigas ĉi-tie la leteron de sinjoro Rollet de l' Isle, same kiel ni estas pretaj publikigi liajn estontajn, eventualajn leterojn.

(8) Se la fakto ke iu radikoj estas Zamenhofa, decidas pri tio, ĉu oni devas oficialigi ĝin aŭ ne, ni ne povas kompreni, kial oni do elektis 21 zamenhofajn radikojn el 25 *zamenhofaj* radikoj proponitaj. Plie, ni ne komprenas, kial oni proponis nur 25 el la kelkcent zamenhofaj radikoj ankoraŭ ne-oficialaj. Estas do evidente, ke zamenhofeco ne estas decida faktoro, nur akcesora argumento, kvazaŭ prestiĝo por iu vorto-kandidato. Tio estas cetere bone, ĉar nia Majstro Zamenhof estis la unua praktikanto de Esperanto-verkado. Ĉiutage li kvazaŭ lernis sian propran lingvon. Li elprovis plurajn formojn. En la Originala Verkaró troviĝas do multaj «forĵetitaj materialoj». Tia estas ekzemple «bankiero», kiun la Akademio tamen alprenis nun. Se la profesio de bankisto estas «bankiero» (ĉar Dro L.L. Zamenhof hazarde renkontis tiun profesi-nomon kaj esperantigis ĝin); oni devas ankaŭ doni nomon al ĉiuj aliaj profesioj kiujn li ne renkontis aŭ esperantigis intence: oni havos do «forĝisto» kaj «forĝerono», «bakisto» kaj «panoforo», ktp. ktp.



En tiu ĉi loko estos bone represi artikolon aperintan en «Nia Gazeto» (junio) kiu ankoraŭ pli bone lumigos la problemon. Oni vidos, ke Oomoto Internacia ne estas la sola gazeto kiu vidas danĝeron en la sinteno de la Akademio. Oni vidos krome, ke la tono de niaj artikoloj neniel estas pli energia ol tiu de sinjoro S. Grenkamp; kiu estas mem Akademiano. «Nia Gazeto» aperas en Francujo: la opinioj malsamas do eĉ en Francujo, eĉ en la Akademio mem. Kial oni postulas, ke ni, en la Fora Oriento, konsentu al ĉio sen kritiko? Sed, bonvolu mem legi la artikolon:

S. O. S.

## Pri la Akademia Laboro

Tiom longe kiom la akademiestro montras sian laboron per diversaj cirkuleroj dissendataj al la gazetoj, per kreo de tuta gamo da literaj titoloj, kiujn la pm.-kolektantoj povos uzi en sia korespondado por montri sian gradon de — scio de esperanto — ĉio estas tolerebla.

Sed kiam la akademiestro aperigas denove liston de oficialigotaj vortradikoj sekvante en tio la Idistan Akademion, mi opinias tion «krimo» kontraŭ la stabileco de nia lingvo.

Aperigi tian listeton spite averto de la kunveno de L.K.-anoj Stokholmo pri la fuŝlaboro de la lasta listo de vortradikoj, kaj spite plurfojaj solenaj promesoj de la Akademio, ke ĝi nur tre malofte kaj post tre atenta ekzameno oficialigados estonte vortojn — estas granda danĝero por la evoluo de nia lingvo. Se la Akademio oficialigus vortojn — ni diru — ĉiukvinjare, tio estus tute sufiĉa. Estas klare, ke ofta publikigado de vortoj enkondukotaj en la vortaron «malaktualigas» la vortarajn eldonojn. Oni ne povas postuli, ke vortaroj aperadu ĉiun jaron. Oni ankaŭ ne povas postuli de ĉiu esperantisto en la mondo, ke li «ĝustigu» sian vortaron laŭ la plaĉo de la akademiestro. Tio elvokas jenon: «oni ne plu atentos la oficialajn listetojn, la prestiĝo de la Akademio pro ĝia facilanimeco fariĝos nula. Jen la granda danĝero por la vivo kaj estonta evoluo de nia lingvo!»

La akademiestro aperigas la liston kontraŭ la ĝisnuna kutimo, nur kun esperantaj difinoj; mankas en ĝi la nacilingvaj tradukoj, kiuj ŝajnas al ni nepre necesaj. La facilanima kopiado de la difinoj el la «Pleua Vortaro» rezultigis, ke la oficialigotaj vortoj estas difinitaj per kelkaj — «neoficialaj» vortoj! Oficialigo de arĥaigintaj «inciatiivo» kaj «inciatoro», kiam oni konstatas, ke ekzistas jam «inciati» kaj ke la tendenco ĉe ni estas uzi «inciatio» kaj «inciatauto», estas pruvo de fuŝa laboro.

Opinii «reteni» radikoj, ĉar en la Universala Vortaro ĝi ne troviĝas apud «deteni» kaj «subteni» ŝajnas al mi iom malserioza pruvo. Ĉu «enteni», «elteni», «alteni», «surteni», ktp., estas do — radikoj? Io simila povas naskiĝi nur en akademja kapo.

Enkonduki «vinkto», kiam la plej seriozaj teknikaj

vortaroj anstataŭigis ĝin delonge per «nito» estas malrekomendinda.

Kia saĝeco kuŝas en tiu arbitra divido de la oficialigitaj vortradikoj en :

1) Aldonataj al la Universala Vortaro kaj, 2) enkondukotaj en la Komunan Vortaron, ni vere ne komprenas.

Sekvi Idistan Akademion por moutri, ke oni laboras (kvazaŭ kopiado de kelkaj difinoj el «Plena Vortaro» estus laboro!) kaj aperigadi ofte listetojn de oficialaj vortoj estas rezervi al esperanto la sorton de — ido.

La Akademio tiam bone laboras, kiam ĝi preparas serioze la oficialigitan liston dum jaroj kaj post longa primedito kaj kiam ĝi ĝenerale havas ian influon al la aperigataj cirkuleroj de la Akademio!

S. GRENKAMP.

P.S. — Sed kion faris en tiu ĉi afero la t.n. direktoro de la Komuna Vortaro? Ni esperis de la nov-elektito iom pli da seriozeco kaj pli da respondemo. Aŭ ĉu aperigo de tiu listo estis farita sen lia decido?

EPILOGE ni devas aldoni la sekvan deklaron. Eble ni troigis, kiel pedagogo troigas por komprenigi problemon, kun bona intenco. Eble ni eraris; *erari estas home*. Sed unu aferon ni deziras emfaze certigi en tiu ĉi loko: nia intenco estis nur defendi la Fundamenton, igi nian lingvon vere tutmonda. Se la Akademio havas la saman intencon, ni kunmarŝos lojale. Se la Akademio subfosos la lingvon kaj anstataŭ kondamni la neologismemulojn senciajn ĝi rezervos anatemojn por ni, fundamentanoj, ni kontraŭbatalos fidele al niaj principoj. Se homoj cedus pro nura «ĝentileco» kien la mondo irus? Ni pensas, ke karaktero estas pli grava ol eĉ ĝentileco. Tial ni el nia tuta koro esperas, ke la Akademio akceptos la manon kiun ni prezentas al ĝi. Finigu la diskuto kaj ni eklaboru kune. Ni atendas kun scivolemo la rezultaton de la Akademianj laboroj, rezultatoj kiuj estos espereble multe pli gravaj ol kelkdeko da vortoj tute specialaj.

Oomoto Internacia.

## Literatura Kritiko

☆ ESPERANTAJ HISTORIETOJ I. Kompilis Peter Frey (Clausensvej 26, Haderslev, Danlando) 13.5x19.5 cm. 48 paĝoj, prezo: 35 ned.cend. Havebla ĉe la kompilinto.

Estas kolekto de ridsanigaj rakontetoj, kvankam la titolo de l' libro erare pensigas ke temas pri historiaĵo de Esp. La kompilinto (redaktoro de Dansk Esp. Blad) intencas helpi la progresigon de l' esp-komencantoj kiuj nur finis la unuan kurson. Tiu ĉi libro speciale por komencantoj, donu la kuraĝon ĝis ili plene maturiĝos!

☆ Jarlibro de la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio (1935). Eldonis Esperanta Akademio. Havebla ĉe: Esperantista Centra Librejo, Parizo. 13x16 cm. 40 paĝoj. Prezo: 2 fr.

Enhavo: Statuaro, Interna regularo, Normaro kaj adresaro de la L.K.-anoj, L.K.-anoj laŭ la lingvoj kaj ilia elirjaro, Akademio, Mallonga historio de la Lingvaj Institucioj, Landnomoj (Zamenhofa sistemo), Oficialigitaj vortradikoj. Kvankam la libro estas malgranda, ĝi estas grava dokumento de seriozaj esp-istoj. Nepre posedu la libron kaj havu ekzaktan konon pri la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio, nur pagante 2 frankojn.

K. Zunna

☆ KAN-U-GO, la nova krucvorta ludo. Tre ŝatata ludo en Anglujo, nun havebla la Esperanta eldono. Ludebla de unu ĝis sep personoj. La aldonita regularo bone klarigas la interesan ludmanieron. Bele enpakita en eleganta, verda skatoleto. Prezo: 2ŝ 6p, afranko 2p. Mendu ĉe la eldononejo, Brita Esperantista Asocio, 142 High Holborn, London, W.C.I.

☆ KOLIN, 16 paĝa, ilustrita gvidilo de la urbo Kolin, Ĉeĥoslovakujo, kun ĝia historieto. Eldonis Esperantista Klubo, Kolin. Senpage sendota ĉe la petskribo.

☆ NOVAJ ESP-GLUMARKOJ: 1. glumarko kun bildo de D-ro Zamenhof. 2. glumarko kun bildo de l' sfinkso kaj piramidoj. Bona propagandilo! Teksto: Esp.-e kaj arabe. Prezo: 100 diversaj por 1 sv. fr. Eldonis: Tados Migalli (Del. de UEA), Fayum, Egiptujo.

## Japanana lingvo por Esperantistoj

Japanlando — lando de Belo, Bono kaj Vero; ĝin helpas kaj favoras la sankta elparolo de P' belanima japana lingvo. — el antikva dokumeto —

( 37 )

### Postpozicioj (daŭrigo)

#### Veraj Postpozicioj (daŭrigo)

Post la resuma pritrakto de la grava postpozicio «*ni*» ni konsideru alian ne malpli gravan kiu estas *de*:

(a) *Ni*(aŭ *E*) aŭ *de* estas uzata por montri lokon de ago: (Se la loko estas grava, oni uzas *ni*).

(I) *Are wa Gaimusyô ni* (e) *tutomete iru.*  
*Are*=tiu (persono)

*Gaimusyô*=Ministerio de eksteraj aferoj (Tokyo)

*tutomeru*=dung(iĝ)i [kiel oficisto]

(II) *Yûmesi wa doko de tabemasu ka?*

*Yû*(=*ban*)=vespero

*Mesi*=manĝo

*doko de?*=kie?

*taberu*=manĝi

(b) *De* montras instrumenton, materialon, prezon:

(I) *Hude de kaku.*=Skribi (=kaku) per peniko.

(II) *Isi de dekita Kabe.*=Muro(=*Kabe*) el ŝtono.

(t.e. «per ŝtono farita muro»)

(III) *Iti yen de katta Sina.*=Varo(=*Sina*) aĉetita(=*kaŭ*: aĉeti) je ¥1.—

\* \* \*

«*To*», alia vera postpozicio, estas tradu-

kebla kiel *kun*:

*Tomodati to sanpo sita.*=Promenis kun la amiko.

\* \* \*

«*Kara*» signifas *de* en ambaŭ sencoj spaca kaj tempa:

(I) *Tôkyô kara kimasita.*=(Li) venis (=kuru: veni) *de* Tokio.

(II) *Mukasi kara*=de la antikveco(=*Mukasi*)

Alia uzmaniero de *Kara*:

*Ame ga hutta kara* (=node), *Miti ga warui.*

(ĉar pluvigis, la vojo estas malbona(kota).)

Tie ĉi «*kara*» signifas «ĉar».

\* \* \*

«*Made*» signifas *ĝis* en ambaŭ sencoj spaca kaj tempa:

(I) *Kameoka made ikô.*=(Ni) iru (*ikô*=*ikimasyô*) ĝis Kameoka.

(II) *Roku zi made*=ĝis la sesa horo

\* \* \*

«*E*» havas spacan signifon de *al*:

*Kyôto e yuku.*=Iri al Kioto.

[fino de «Veraj postpozicioj»]

### Praktika Konversacio

#### Japanana

A) *Kon'nitiwa!* *Kyô*<sup>1</sup> *wa taihen*<sup>2</sup> *Sora*<sup>3</sup> *ga kumotte*<sup>4</sup> *Ame*<sup>5</sup> *ga hurisô desu.*

B) *Sô desu.* *Warui*<sup>1</sup> *Tenki*<sup>2</sup> *desu.*

A) *Kinô*<sup>1</sup> *anata wa Hozu-gawa e sanpo simasitaka*<sup>2</sup>?

#### Esperanta

A) *Bonan tagon!* *Hodiaŭ*<sup>1</sup> *treege*<sup>2</sup> *la ĉielo*<sup>3</sup> (estas) *nuba*<sup>4</sup>, *pluvo*<sup>5</sup> *minacas fali* (ŝajnas, ke pluvos). (*hurisô desu*=minacas pluvi)

B) *Tiel estas (jes).* Estas malbona<sup>1</sup> vetero.<sup>2</sup>

A) Ĉu hieraŭ<sup>1</sup> vi al la rivero «*Hozu*» promenis<sup>2</sup>?



B) Watasi wa Hima<sup>1</sup> ga nakatta kara,<sup>2</sup> iti niti dyû<sup>3</sup> Uti ni<sup>4</sup> imasita.

A) Doko<sup>1</sup> de kotosi wa<sup>2</sup> Nippon Esperanto-Taikai<sup>3</sup> ga arimasu<sup>4</sup> ka?

B) Nagoya de hirakaremasu.<sup>1</sup>

A) Kimi wa Taikai<sup>1</sup> e syusseki simasu<sup>2</sup>ka?

B) Motiron<sup>1</sup> boku wa syusseki simasu.<sup>2</sup>

B) Ĉar<sup>2</sup> mi ne havis liberan tempon<sup>1</sup>, tutan tagon<sup>3</sup> (mi) estis en la hejmo.<sup>4</sup>

A) Kie<sup>1</sup> en ĉi tiu jaro<sup>2</sup> Japana Esperanto-Kongreso<sup>3</sup> estos<sup>4</sup> (okazos)?

B) En Nagoya (ĝi) havos lokon.<sup>1</sup>

A) Ĉu vi (=kimi: al intima amiko) al la Kongreso<sup>1</sup> ĉeestos<sup>2</sup>?

B) Kompreneble<sup>1</sup> mi (=boku: al intima amiko) partoprenos<sup>2</sup> (al ĝi).



### Manĉurujo progresas

Sovetunio cedis al Manĉurujo fervojojn al si apartenintajn, kiuj kuras en nuua Manĉurujo. Ĉar la interrela larĝeco de tiuj fervojoj estis pli vasta ol tiuj en Manĉurujo, oni devis mallarĝigi la ricevitajn relojn. Je la 5-a, matene (31, aŭg.) 2300 fervojistoj komencis labori sur Keihin-linio 240-kilometra, unu el la ricevitaj linioj. Post nur du horoj kaj dudek minutoj la granda laboro finiĝis. Nepremeblaj ĝojkrioj eksplodis kiel tondro en amaso da kunlaborintoj, kiam la unua vagonaro marŝis preter ili. Brave! la tekniko de Fervoja Ministerio de l' juna Manĉurujo notis brilantan sukceson sur la paĝo de l' fervoja historio de l' tuta mondo.

### Gesinjoroj Mason deziras vivi en Japanujo

Sinjoro J.W.T. Mason kaj lia edzino denove vizitis Japanujon per japana ŝipo «Hakone-Maru» kiu alvenis al Kobe, la 5-an de sept. Li estas malofta scienculo pri

japana ŝintoismo. Ĉi-foja vizito de l' gesinjoroj estas por loĝi konstante en Japanujo, kiu ĉarmis kaj kaptis ilian koron. Kiam ili elŝipiĝis oni aŭdis lian jenan parolon:

«Post foriro de Japanujo en la antaŭlasta jaro ni tramigris Eŭropon: Anglujo, Francujo, Hispanujo, Italujo, Germanujo kaj Maroko de Afriko. En ĉiuj landoj kiujn ni vizitis, ni facile agnoskis, ke la intereso kaj scivolemo pri Japanujo pli kaj pli multiĝas. Laŭ peto de universitatoj en Amerikoj Norda kaj Suda, mi faris paroladon pri japana ŝintoismo. Speciale en Pariza Universitato mi havis grandan sukceson, dank' al la klopodo de D-ro Bergson. Sur la revena vojo al Usono en Singaporo, mi ankaŭ faris paroladon pri la interrilato de japanoj kaj ĉinoj. La aŭdantaro ĉefe estis ĉinoj, kiuj serioze aŭskultis min. Antaŭ alveno al Japanujo mi eldonis anglan eldonon de «Kannagara-no-Miĉi», kiun mi verkis en Japanujo dum la lasta vizito.»

### Japanoj loĝas en ĉiu mondparto

Ministerio de Eksterlanda Afero publikigis statistikojn kiuj sin bazas sur la esploro de la 1a de Okt. 1934. Laŭ la statistikoj oni vidas, ke 1803000 japanoj loĝas ekster Japana Imperio. Kompare al la esploro de la antaŭlasta jaro, puraj japanoj—803000, koreoj—74000, formosanoj—

1000 pli multiĝis ol antaŭe. Tio estas 21-5000 japanoj pli multiĝis en fremdaj landoj, kio klare montras fekundecon de nia Imperio. En Manĉurujo 243668, kiu cifero montras duoblan plimultiĝon ol en la jaro de Manĉuria Konflikto; en la dua vico Brazilo situas kun 173500 enmigrintoj, kaj sekvas Havajo, sukera insulo en kiu loĝas 150832, kaj 146708 en Usono; la kvina estas en ĉinujo — 50649; la sesa ege malaltiĝis — 21127 en Peruo; la sepa en Kanado — 21062; la oka en Filipino — 20558; Britujo — 1423; Francujo—513; Germanujo—530; Belgujo—56; Nederlando—28; Pollando—19; Svisujo—70; Italujo—60; Sovetunio(ĉefa lando)—79; Ekstrema Orienro (Siberio)—2492; Siamo—389; Hindujo, Cejlono—1416; Meksiko—5360; Salvadoro—6. (Ni esceptis *Kantōsyū* apud Manĉurujo kaj Japanan mandatitan insularon sur Suda Pacifiko)

### Sankta Meko en Japanujo

En la aŭtuna serena vetero en Kobe oni nun konstruis novan vidindaĵon, kiu estas la trietaĝa moskeo de Islamo. Ĝi stariĝis sur la monteta kvartalo de l' urbo, nome Yamate, de kiu oni povas malsuprenvidi tutan havenurbon. En Kobe loĝas preskaŭ 300 adeptoj de Islamo, kiuj varbis helpbrikojn inter si por konstrui sian preĝejon laŭ rito de Islamo. La apero de tiu preĝejo devas esti ekzotika bildo en Kobe, kiu cetere estas sufiĉe internacia urbo.

### Edziniĝo al la ostoj

F-ino Masae Sugisaki en Tokio pacience atendadis tridek jarojn por edziniĝi al sia unua amato, de kiu ŝi disiĝis en la knabineco, ĉar la amato veturis al Ameriko. Multajn jarojn ŝi ne povis ricevi leteron de li, nek aŭdeti pri li; tamen ŝi pacience atendadis la revenon de la amato, ne edziniĝante al alia. La lastan jaron ŝi ricevis leteron de la longlongtempe atendata amato, S-ro Kjoiči Ooja en Ĉikago:

Kara mia!

...eble tiu ĉi vespero estos la lasta por mi, sed ne tro ĉagreniĝu pensante, ke ĉio estas en la mano de la sorto. Mi estas tre feliĉa, ĉar mia koro komunikadas al via. Ĉiam mi havas en la koro vian figuron, al kiu mi adiaŭis antaŭ tridek jaroj, kiam vi estis deksejjara belega knabino. Granda bedaŭro por mi estas ja tio, ke mi devos morti antaŭ ol mi povos aŭdi vian sopiratan voĉon «kara edzo!»...

Kun neniam velkema amo mi restas,  
Via Kjoiči.

En la malproksima lando, dekojn da jaroj li laboris kaj laboris por akiri monon, per kiu li intencis vivi feliĉan edzecon kun la amatino, reveninte al la patrolando; sed tamen ĉio estis malfavora al li: li devis vagi tien kaj reen kaj finfine, en mizera stato de Ĉikago li estis atakata de malsano grava, kiu minacis lian vivon, kiel la letero diras.

Finfine, en la lasta aŭtuno la kompartinda amato mortis, kaj liaj ostoj senditaj atingis al Japanujo. Al ĝi la jam maljuna fraŭlino ĵuris: «Eĉ se vi mortis, mi estas via edzino por eterne.» Kaj ŝi baldaŭ okazigos la edziniĝan ceremonion kun la ostoj de la amato, oni diras.

### Artefare elkovis strutojn

Malfacilan kaj strangan deziron plenumis s-ro T. Takasaki, direktoro de iu kompanio en Osaka. Li havas zoologian ĝardenon, kiu ĉefe nutras krokodilojn, lacertojn kaj aliajn tropikajn animalojn. Li sukcesis artefare elkovi tri strutojn, la plej malgranda el kiuj pezas 660 gramojn kaj 1830 gr, la plej granda. La elkoviĝintoj sen gepatroj estas tre viglaj kaj eĉ zigzagas! en la ĝardeno sub la protekto de l' mastro. La energia homo, Takasaki multfoje malsukcesis en tiu ĉi provo kaj 300 ovoj de strutoj putriĝis dum tri jaroj. Tiom pli grandaj estas lia ĝojo kaj fiero! Eĉ oficistoj de «Zoologia Ĝardeno» de Osaka miras pri lia sukceso. Atentu, ĉar en estonteco kiam en Afriko kaj Aŭstralio elĉerpiĝos la strutoj, ni resendos ilin al la hejmdezerto!

## MOVĴOJ kaj EĤOJ

### Al Tienŝin, Ĉinujo.

En Tienŝin sidas la loka Centro de Oomoto, kiu efike laboradas en facile akriĝema atmosfero en norda Ĉinujo, kie loĝas japanoj, ĉinoj kaj manĉuroj. Havante dekon da kunlaborantoj, la Centro ankoraŭ bezonas multajn aliajn. La 12an de julio veturis tien s-ro T. Nakagaŭa, kiu estas tre laborema junulo.

### Majstro O. Deguĉi

lastatempe restadas en Kameoka post jar-daŭra vojaĝo tra Japanujo por la movado de «*Sinseikai*», tamen li estas tre okupata en nia teritorio same, kiel en vojaĝo, ĉar ĉiuj funkcioj de multaj organizoj de Oomoto kaj U.H.A. estas sub lia direktado.

### Sinjoro Hidemaru Deguĉi

finis ĝuste monatan vojaĝon en *Ŝikoku*, kiu estas aparta insulo de ĉefa lando (la 8-a de julio — la 7-a de aŭgusto). Lokaj Oomotanoj estis kuraĝigataj kaj favorataj de lia granda amo. Li vizitis 43 Oomoto-filiojn, kaj li afable akceptis multe da vizitantoj kiuj kalkuliĝis 1515 laŭ informo de lia sekretario. Li speciale preĝis kaj petis al Dio por resanigi 132 mal-sanulojn.

### S-ro T. Uŝiro,

spĉiale sendita misiisto de U.H.A.-Centro en Kameoka al Ponape (Suda Maro) revenis la 18-an de julio. Laŭ lia raporto la «Agrikulturejo de

Homamo» en Ponape progresas en bona ordo. Li akompanis du junajn insulanojn, kiuj estas fervoraj U.H.A.-membroj. Ili nun vivas inter ni en Kameoka kaj diligente lernas japanan lingvon pararele kun studoj pri Oomoto kaj U.H.A. Kiam la junaj frattoj, nome, Jhonny reiros al Ponape, nia movado estos pli aktiviĝos en ĉiu insulo de Suda Maro.

### La Festo de Sankta Nasko\*

havis lokon en Ajabe kaj Kameoka dum tri tagoj, 10-12 de aŭgusto; en la lasta tago oni havis Dekjaran jubileon de U.H.A.


### Belga mondvojaĝanto.

En vespera krepusko de la 16-a, aŭg. belga mondvojaĝanto, Eŭgeno Gaspard Marin ne atendite vizitis nin. Li estas vojaĝamanto, jam 25 jarojn migranta. Lia hazarda vizito al nia teritorio okazis pro Esperanto, kiun li lernis en vojaĝo pro neceseco. La teritorio tre plaĉis al li, tiel ke li restadis unu semajnon inter ni kaj serioze studis pri Oomoto kaj U.H.A.

### Sinjoro Hidemaru Deguĉi

forveturis al Tottori-provinco la 8-an de sept.

\* Naskotaga Festo de Majstro O. Deguĉi.



La 4-a Kongreso de Hokkaido Esperantistoj.

laŭ invito de l' lokaj Oomotanoj. Du tagojn poste lia sekretario N. Itoo sekvis lin. La vojaĝo bezonos du semajnojn.

#### S-ro Kitamura,

nia sendito al *Tienŝin* kaj nun gvidanta lokan Oomoto-Centron de *Tienŝin* revenis la 17-an de sept. por informi ĝisnunajn laborojn en norda Ĉinujo al la Kameoka-estraro. Lia foresto estis sufiĉe longtempa, dum pli ol du jaroj li propagandis Oomoton kaj la spiriton de U.H.A. Dank' al lia energia propagando oni havas multe da ĉinaj simpatuloj spite de ofte akriĝema atmosfero de norda Ĉinujo.



#### La 4-a Kongreso de Hokkaido Esperantistoj

havis lokon en *Obihiro* por du tagoj, la 3-an kaj 4-an de aŭgusto. Kvankam Hokkaido estas plej norda insulo de Japanujo, tamen la partoprenantoj estis sufiĉe multaj: sesdek gesamideanoj kunvenis sub la verda standardo. Urba Oficejo kaj Komerca Domo donacis al ĉiuj partoprenantoj gvidlibrojn de la urbo. En tiu ĉi Kongreso unuanime aprobitaj rezolucioj estas: 1) Invitu la 24an Kongreson de Japanaj Esperantistoj (por venonta jaro) al *Sapporo*, ĉefurbo de Hokkaido. 2) En la nomo de Kongreso instigu Hokkaido-registaron ke oni enkonduku Esperanton en lernejojn. 3) En la nomo de Kongreso proponu al ĉiu radiostacio en Hokkaido, ke oni dissendu Esperanto-kurson.

#### La 23-a Kongreso de Tut-japana Esperantistaro

okazos en *Nagoja* dum 22-23-24 de septembro. Jam estas supozeble, ke la Kongreso havos multe da partoprenantoj, ĉar la kongres-urbo sidas meze de Japanujo. Nia Centro de U.H.A. kaj Esperanto-Propaganda Asocio sendos reprezentantojn al la Kongreso, kaj multe da membroj ankaŭ subtenos la Kongreson per sia ĉeesto. Detalan informon ni faros en la sekvonta numero.

## KORESPONDADO

Anonceto kostas 2 respondkuponojn (ĝis 3 linioj).

Abonanto de O.I. rajtas senpage publikigi anoncetojn dufoje en la jaro.

Mallongigoj: L=letero, PK=poŝtkarto, PI=poŝtkarto ilustrita, PM=poŝtmarko.

S-ro O. Carlacchini, Via G. Marconi 33, Pisa, Italujo, deziras korespondi kaj interŝanĝi belajn bildojn de vidaĵoj kun la tuta Azio, Afriko kaj Aŭstralio. Certe respondos.

Deziras korespondi pri vivado de minej-laboristoj kun samideanoj en la tuta mondo. Respondo garantiata. S-ro Litera Franta, Dubi u Kladna, poŝto Vrapice, Ĉeĥoslovakujo.

S-ro Donald Mc Clellan, 11715 Lincoln Avenue, South Ozone Park, New York, Usono, deziras korespondi kun la tuta mondo, escepte de Eŭropo, pri filozofio kaj kutimoj.

Sendas aŭstraĵojn kontraŭ diversaj japanajoj: infan-fotoj, bildoj, desegnaĵoj, PM, ilustr. gazetoj, insignoj, ktp. S-ro Kurt Thoma, Amstetten, Wörthstrasse 10, Nieder Aŭstrujo.

300 Gelernintoj de Ĉe-kursoj de Lidja Zamenhof en Lyon kaj ĉirkaŭaĵo deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Skribu al s-ro Daniel Prost (sekretario de Esp-ista Universitata Rondo), 3, Rue Ney a Lyon, Francujo.

S-ro Ferd. Greinecker en Bystrice Hastyn Ĉeĥoslovakujo deziras nepreparitajn aziajn papiliojn kontraŭ elektita rekompenco: P. I., P. M., fotoĵoj, desegnaĵoj, k.a. Respondo garantiata.

*Japano mondvojaĝos ekde 1936!* Tiucele mi deziras korespondi kun eŭropaj gesamideanoj por antaŭe konatiĝi. S-ro Takateru Kamimura, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

S-ro Gunnar Anderson, Vanadislunden 2 B, I tr. Stockholm, Svedujo — deziras korespondi kun la tuta mondo kaj interŝanĝi PM, PI.; ĉiam respondas.

Franca studentino deziras interŝanĝi PI nur kun japanaj studentoj. Mia adreso: J. Denizot, a Donnay par Thury-Harcourt, Calvados, Francujo.

Kun japanaj samideanoj deziras korespondi, s-ro Povhe Vanda, Ljubljana, Cojzova 9/11., Jugoslavujo.

# Enhavo

Gisnuna laboro kaj nova espero de U.H.A.	3	Japanujo (12)	21
Parizaj rememoroj	4	Reĝo kiu havis dentdoloron	23
Saluton al U.H.A.	5	Ĉu vera religio povas esti nacia?	24
Tutmonda misio de U.H.A.	6	La Akademio kaj Ni	25
Longe vivu por Mond-bonigado	8	Literatura kritiko	29
Laboroj de UHA dum 10 jaroj	9	Japana lingvo por Esperantistoj (37)	30
El malnova taglibro	15	Japana kroniko	31
Kormoranoj	16	Movoj kaj choj	33
Socia ekonomio (2) Interŝanĝo kaj valoro	18		

## NIAJ REPRESENTANTOJ

<b>Aŭstralio</b> S-ro L. Thomson, c/R; Rawson, 169 Exhibition street. Melbourne.	S-ro Anton A. Ehm, Nürnberg, Essenweinstr. 4/11, S-ro Gottlieb Strofmer, Munchen S. 50. Bavarujo, Dietramszellestr. 10. 21.	<b>Jugoslavujo</b> S-ro Marko Dominis, Split Zrinjska Str. No I d.
<b>Aŭstrujo</b> D-ro Carl Mimler, Wien VIII, Albertgasse 1-a, S-ro Bernhard Selzer, Wien VIII., Alserstr. 55/9	S-ro K. O. Schmidt, Brixstr. 8 a, Flensburg. S-ro F. Bachmann, Bahnhofstr. 5/1. Heilbronn.	<b>Latvujo</b> S-ro Karlo Subergs, Riga, Milgravis azera str. 6--1.
<b>Brazilo</b> S-ro Majumi Kondo, Caixa postal 3594, S. Paulo.	<b>Hindujo</b> S-ro Liem Tjong Hie, Semarang, Karangtoeri 66, Java.	<b>Litovujo</b> S-ro Andrius Borkauskas, Pakruojaus g. 3. Radviliškis.
<b>Bulgarujo</b> S-ro Ivan Kirov, Popska, 484 Sliven. S-ro Georgi Dončev, str. oficerska 25, Tirnovo. S-ro Atanas Nikolov, Sevlievo, Burgas.	<b>Hispanujo</b> S-ro Franciako Miralles, Hellin (Albacete). S-ro Salvador Viladelmas, Colon 52-54, Sabadell (Bar- celono).	<b>Nederlando</b> F-ino G. de Waart, Box 23, Hilversum.
<b>Ĉeĥoslovakujo</b> S-ro Rudolf Burkert, Kalvariengasse 34-IV, Nie- mea. S-ino Sofie Cipera, Plzen III, Zizkova 52.	<b>Hungarujo</b> S-ro Paŭlo Balkanyi, Poŝto 507, Budapest.	<b>Novzelando</b> F-ino Coralie Smythson, 47A Aurora Terrace, Wellington, C. 1.
<b>Francujo</b> S-ro Simon Frantz, 21, rue Alain Chartier, Paris XV.	<b>Ĥinujo</b> S-ro Sh. M. Chun, N.Y.M.S. Lunghuwa, Shanghai.	<b>Persujo</b> S-ro Darius Nemseči, Tabriz.
<b>Germanujo</b> S-ro Kurt Wuensche, Augustenstr. 17, Leipzig-R.	<b>Italujo</b> S-ro Luigi Minnaia, Via del Giglio 16, Roma 115. S-ro Giulio Matuella, Corso Garibaldi 325, Mazzolombardo (Torento).	<b>Polujo</b> S-ro Adolf Oberrotman, Varsovio, Krak—Przedm 10 S-ro Denysiuk Les, Bolechov, ul. Stryjska 12.
		<b>Svisujo</b> S-ro Karl Jost, Stolzestr. 7, Zurich 6.
		<b>Usono</b> S-ro John Lester Lewine, 150 E. 72 nd. St. New York S-ro K. A. Suzuki, Orange Petroleum Co. Ora- nge (Texas)

## OOMOTO INTERNACIA

### Abontarifo:

Unujara abono = 5 sv.fr., aŭ egalvaloro.

Subtena abono = 20 sv.fr., por 5 jaroj.

Dumviva abono = 50 sv.fr.

### Anonctarifo:

Reklamo: 1 paĝo = 30 sv.fr., 1/2 paĝo = 15 sv.fr.

Anoncteto: ĝis 3 linioj = 2 respondekuponoj.

Monon sendu per poŝtmandato, se neeble, per mon-  
biletoj aŭ respondekuponoj, rekte al la Adm.:

Oomoto Internacia, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

## INTERŜANĜO

Ni interŝanĝas reklamon kun tutmondaj  
Esperanto-gazetoj. Dezirantoj sendu al ni  
anonctekstojn. Ni estas ĉiam pretaj por  
reciproka servo. «Oomoto Internacia»

定價 壹部 貳拾錢 壹ヶ年貳圓四拾錢

昭和十年十月一日印刷 昭和十年十月一日發行

編輯發行印刷人 高木鐵男 京都府南桑田郡龜岡町  
荒塚字内丸一

印刷發行所 天聲社 (振替大阪75917番) 全

Ĉiu vera Esperantisto devas kunlabori al la organo Homaranisma «Oomoto Internacia»!

Ĉiuj amikoj de O.I., Abonantoj, Reabonantoj, Abonigantoj al O.I. ricevas premion el jenaj:

«**Ŝikiŝi**»: japanpropra surmura ornamajo kun karakteriza bildo. Bela japana memorajo!

«**Fundamento de Animo**»: pritrakto pri homa spirita mondo, ktp. 50 paĝoj.

«**Kio estas Oomoto?**»: Konciza konigilo pri Oomoto movado. 100 paĝoj.

«**Serio da 12 Oomoto-bildkartoj**» kun Esp.-klarigoj.

*Sendependa organo libera por ĉiuj*

## Nia Gazeto

monata, jurnalforma, okpaĝa, ilustrita, zorge redaktita. Interesa kaj varia enhavo. Direktoro: G. Avril. Redaktoro: S. Grenkamp. Jarabono: 3 sv. fr. Specimeno kontraŭ resp. kupono. Red. kaj Adm.: 29, Av. de la Victoire, Nice, Francujo.

La sola, semajna, sendependa, universala, ilustrita organo de la Esperanto-movado,

## Heroldo de Esperanto

4-8 paĝa, taggazeta formato, kun aldonoj por ĉies gusto: lingva kritiko, la bela mondo, la anteno, la verda sperto, la strigo, humoro-distroludo, la regno virina, nia revueto. Trimonata abono (13 numeroj): 2.70 gmk.

Petu senpagan specimenon, kun katalogoj de Esp-libroj ĉe: Heroldo de Esperanto, Brüsseler Str. 94, Köln, Germanujo.

Nepre havinda verko de ĉiuj homaranoj!

## Sinjoro Laŭdata

Literatura trezoro, kun originalaj poemoj kaj frazoj de ĉ. cent esperantistoj.

Luksa eldono, ore surprisita, tole bindita, 200 paĝa. Kompilita de nia ĉefredaktoro Koogecu Niŝimura. Granda prezmalaltigo: 1.50 sv. fr. aŭ egalvaloro.

Mendu ĉe: Librofako de Oomoto Internacia, Kameoka (Kioto-hu) Japanujo.

*Kial la nuna mondo baraktas meze de diversaj malsanoj? Ĉu la homaro pereos? Ĉu la lasta juĝo okazos baldaŭ? Ĉu la savo venos el Oriento? Kie jam aperis Mesio?*

Kio estas  
Oomoto?



KIO ESTAS OOMOTO? 5-a eldono, klare traktas kaj respondas la demandojn. 100 tekstopaĝoj, 6 specialaj fotopaĝoj. Prezo: 1 sv. fr., aŭ 4 resp. kup. Mendu ĉe: Librofako de Oomoto Internacia, Kameoka, Japanujo.

Ĉu vi kredas, ke scienca literaturo estas malfacila?

Vi certe modifos tiun opinion post legado de la popularscienca

## SCIENCA GAZETO

dumonata, regule aperanta. Pligrandigita, ĝi nun aperas sur 20 dense presitaj paĝoj kaj kovrilo. Pluan pligrandigon ni projektas. Jarabono: Unu dolaro. Specimeno kontraŭ resp. kupono.

Amerika Esperanto-Instituto,  
556 State St., Madison, Wis., Usono.

